

EL POPOLA ĈINIO

人民中國新聞

10  
1970

## Vortoj de Prezidanto Maŭ

Ni devas nepre havi grandajn kaj bravajn proletarajn aspirojn, kuraĝi iri vojon neniam iritan kaj surgrimpiti altan montpinton neniam surgrimpitan de niaj antaŭuloj.





Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ

# Prezidanto Delegacio

Je la 13-a de julio nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima kunbatalanto Vicprezidanto Lin Biaŭ intervidiĝis kun la Franca Registara Delegacio estrata de Andre Bettencourt, ministro-delegito ĉe la ĉefministro, komisiita pri planado kaj taŭgaranĝo de teritorio.

Prezidanto Maŭ kaj lia intima kunbatalanto Vicprezidanto Lin Biaŭ manpremis kun Ministro Andre Bettencourt kaj lia edzino, Ambasadoro de Francio al Ĉinio Etienne Manac'h kaj lia edzino, kaj membroj de la delegacio por ilin bonvenigi kaj fotiĝis kune kun ili.



Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ manpremas kun Ministro Andre Bettencourt.

# o Maŭ Intervidiĝis kun la Franca Registara o Estrata de Ministro A. Bettencourt

Poste, Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin havis amikan interparolon kun la francaj honorindaj gastoj.

Honorindaj gastoj kiuj partoprenis la interparolon estis: Ministro Andre Bettencourt kaj lia edzino; Etienne Manac'h, franca ambasadoro al Ĉinio, kaj lia edzino; Jacques de Beaumarchais, direktoro de la politikaj aferoj de la Franca Ministerio de Eksteraj Aferoj; kaj Christian d'Aumale, vicdirektoro de la ekonomiaj kaj financaj aferoj de la Franca Ministerio de Eksteraj Aferoj.

La intervidiĝon kaj interparolon partoprenis ankaŭ Ĝoŭ Enlaj, ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko; Kang Ŝeng, vicĉefkomitatano de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Kongreso de Popolaj Rezentantoj; kaj Li Hiannian, vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro.

Dum la intervidiĝo ĉeestis respondeculoj de la koncernaj departementoj de Ĉinio Luo Gujbo, Li Kiang, Vang Hajjong, Tang Hajguang, Han Hju kaj Li Hanĝen.

Ĉeestis ankaŭ diplomatoj de la franca ambasadorejo al Ĉinio.



Prezidanto Maŭ kaj lia intima kunbatalanto Vicprezidanto Lin Biaŭ fotiĝas kune kun ĉiuj membroj de la Franca Registara Delegacio estrata de Ministro Andre Bettencourt.



# Vizito de la Franca

## Registara

### Delegacio al Ĉinio

**L**Aŭ invito de nia registaro la Franca Registara Delegacio estrata de Andre Bettencourt, ministro-delegito ĉe la ĉefministro, komisiita pri planado kaj taŭgaranĝo de teritorio, faris amikan viziton al nia lando de la 7-a ĝis la 22-a de julio.

Kiam la delegacio atingis Pekinon, ĝi ricevis varman bonvenigon de respondeculoj de koncernaj departementoj de nia lando.

Je la vespero de la 8-a, Li Hiannian, vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro de nia lando, donis bankedon por bonvenigi la Francan Registaran Delegacion estratan de Ministro Andre Bettencourt.

Ambasadoro de Francio al Ĉinio Etienne Manac'h kaj aliaj diplomatoj de la ambasadorejo ĉeestis laŭ invito la bankedon.

Vicĉefministro Li Hiannian kaj Ministro Bettencourt faris paroladon ĉe la bankedo unu post la alia.

En sia parolado vicĉefministro Li Hiannian esprimis kredon, ke la nuna vizito de la delegacio helpos la interkomprenon kaj disvolviĝon de la amikaj rilatoj inter Ĉinio kaj Francio.

Li diris, ke la ĉina registaro konsekvence staras por establo kaj disvolvo de reciprokaj rilatoj inter landoj kun malsamaj socisistemoj sur la bazo de la kvin principoj de paca kunekzisto. En 1964, dank' al kuna klopodo de la tiama franca prezidanto Generalo de Gaulle kaj nia registaro stariĝis diplomatia rilato inter niaj du landoj. En la lastaj jaroj, Ĉinio kaj Francio tenis inter si bonajn rilatojn.

Li diris, ke ni de ĉiam staras por tio, ke internaj aferoj de diversaj landoj devas esti solvitaj de iliaj propraj popoloj. La rilatoj inter landoj devas esti starigitaj sur la bazo de la kvin principoj de paca kunekzisto. Ni firme oponas kontraŭ la agresa kaj milita politiko de Usono kaj kontraŭ la interveno fare de Usono en internajn aferojn de aliaj landoj. La granda popolo de Francio havas gloran tradicion de rezistado kontraŭ fremdlanda agreso kaj interveno.

Vicĉefministro Li Hiannian diris, ke ne volontante akcepti siajn malvenkojn en diversaj lokoj de la mondo la usona imperiismo insistas antaŭenpuŝi sian agresan kaj militan politikon. Ĝi daŭre perforte okupas nian teritorion Tajvan, subtenas Japanion revivigi militarismon kaj senĉese plivastigas la hindoĉinian militon en Azio, kaj plenenergie subtenas Izraelon agresi arabajn landojn en Meza Oriento. Li diris, ke post terura fiasko en agreso kontraŭ Vjetnamio kaj Laoso, Usono planis kaj direktis la reakcian ŝtatrenverson de la kliko de Lon Nol kaj Sirik Matak kaj invadis Kamboĝon. Pro la plivastigo de la milito en Hindoĉinio, Usono estas terure brulvundita de la indigna incendio de rezistado de la tri hindoĉiniaj popoloj kaj ankaŭ estas forte oponata kaj kondamnata de la publikaj opinioj de diverslandaj popoloj de la tuta mondo inkluzive de la usona. Vicĉefministro Li Hiannian refoje deklaris, ke la ĉinaj registaro kaj popolo firme subtenas la justan starpunkton de la Ŝtatestro de Kamboĝo Samdek Norodom Sihanuk pri nacisavo kaj rezisto kontraŭ la usona imperiismo kaj firme subtenas la kontraŭusonon nacisavan batalon de la tri hindoĉiniaj popoloj ĝis la akiro de la plena venko.

En sia parolado Ministro Bettencourt diris: Mi kredas, ke la vizito de ni komencita hodiaŭ signas novan paŝon en reciproka proksimiĝo kaj interkompreno de ambaŭ niaj landoj.

Li diris, ke kiam li, kiel membro de la Franca Parlamenta Delegacio, faris viziton al Ĉinio en 1964, la akcepto donita de Ĉinio al la delegacio profunde impresis lin.

Ministro Bettencourt diris, ke la ĉiam pli grava rolo ludata de Ĉinio sur la internacia areno estas unu el la faktoroj kun decida signifo de nia epoko. Pri tio ĉi neniu ajn povas dubi. Francio scias, ke Ĉinio estas vigloplena lando kun entreprena spirito. Ministro Bettencourt esprimis, ke li faros kontribuon por akcelo de reciproka proksimiĝo inter la du landoj kaj du popoloj de Francio kaj Ĉinio.

Posttagmeze de la 13-a, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima kunbatalanto Vicprezidanto Lin Biaŭ intervidiĝis kun la Franca Registara Delegacio estrata de Ministro Andre Bettencourt.

Prezidanto Maŭ kaj lia intima kunbatalanto Vicprezidanto Lin Biaŭ manpremis kun Ministro A. Bettencourt kaj lia edzino, Ambasadoro de Francio al Ĉinio E. Manac'h kaj lia edzino, kaj la aliaj membroj de la delegacio por ilin bonvenigi, kaj fotiĝis kune kun ili.

Poste, Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin faris amikan interparolon kun Ministro A. Bettencourt kaj aliaj francaj honorindaj gastoj.

Antaŭ tio, t.e. en la posttagmezo de la 10-a, Ĝoŭ Enlaj, ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro de nia lando intervidiĝis kun ĉiuj membroj de la Franca Registara Delegacio kaj faris amikan interparolon kun Ministro A. Bettencourt kaj aliaj francaj honorindaj gastoj.

Ministro A. Bettencourt kaj lia edzino, E. Manac'h, ambasadoro de Francio al Ĉinio, kaj lia edzino donis dankan bankedon en la vespero de la 13-a.

Vicĉefministro Li Hiannian kaj respondeculoj de koncernaj departementoj ĉeestis la bankedon laŭ invito.

Dum tosto, Ministro A. Bettencourt dankis ĉinajn gvidantojn kaj la ĉinan popolon pro ilia akcepto al la delegacio. Li diris, ke la nuna vizito profunde impresis la delegacion. Li diris: Dank' al la klopodo de via registaro via popolo bone vivas, havante laboron kaj grandan idealon, ĉio ĉi tio devas

atribuiĝi al la plej alta gvido de Prezidanto Maŭ. Ni estas kontentaj pri la interparoloj kun diversnivelaĵaj gvidantoj de Ĉinio.

Dum tosto, Luo Gujbo, vicministro de eksteraj aferoj de Ĉinio, diris ke la interŝanĝo de opinioj pri la problemoj komune interesantaj ambaŭ flankojn helpas interkomprenon kaj disvolviĝon de la amikaj rilatoj inter la du landoj. Malgraŭ la malsameco de la socisistemoj de Ĉinio kaj Francio, tamen la amikaj rilatoj inter la du landoj povas disvolviĝi sur la bazo de la kvin principoj de paca kunekzisto.

La bankedo iris en amika atmosfero.

De la 15-a ĝis la 22-a de julio la franca delegacio vizitis Jan-an, Hi-an, Nankinon, Hangĝoŭ, kaj Ŝanhajon. Dum sia vizitado la delegacio estis akompanata de Ambasadoro Manac'h kaj lia edzino.

Kiam la francaj honorindaj gastoj vizitis la revolucion sanktejon Jan-an, ili vizitis la lokojn kie iam loĝis kaj laboris nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj memorigan domon pri la revolucionaj aktivadoj de Prezidanto Maŭ en Jan-an. La delegacio faris ekskurson al pitoreskejoj kaj historiaj lokoj de Hi-an, vizitis la Nankinan Jangzi-pontegon, la Hangĝoŭ-an Silkteksejon "Dongfanghong", la Mejgiavu-brigadon de Hihu-komunumo, la Ŝanhajan Sesan Popolan Hospitalon kaj la Industrian Ekspozicion de Ŝanhajo. Dum sia vizito al Ŝanhajo la delegacio spektis la revolucion modernan simfonian muzikon *Ŝagiabang*.

Dum sia vizito en diversaj lokoj, la Franca Registara Delegacio ĝuis bonvenigon de respondeculoj de la lokaj revolucionaj komitatoj. Gaŭ Hinghaj, vicestro de la Revolucia Komitato de Jan-an-subprovinco; Hiaŭ Ĉun, vicestro de la Revolucia Komitato de Ŝenhi-provinco; Jang Guangli, vicestro de la Revolucia Komitato de Giansu-provinco kaj samtempe estro de la Revolucia Komitato de Nankino; Hie Ĝenghaŭ, vicestro de la Revolucia Komitato de Ĝegiang-provinco, kaj Vang Ŝaŭjong, vicestro de la Revolucia Komitato de Ŝanhajo, ĉiuj donis bankedon respektive por bonvenigi la francajn honorindajn gastojn.

Kiam la Franca Registara Delegacio forlasis Ŝanhajon per aviadilo je la 22-a de julio, Feng Guoĝu, membro de la Konstanta Komitato de la Revolucia Komitato de Ŝanhajo, respondeculoj de koncernaj departementoj kaj Tang Hajguang, vicestro de la Departemento pri Okcidenta Eŭropo de la Ministerio de Eksteraj Aferoj de Ĉinio, iris al la aerodromo por adiaŭo.

# Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj Donis

## Intervjuon al Francaj Ĵurnalistoj

**E**N la 14-a de julio, Ĝoŭ Enlaj, ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko, intervidiĝis en Pekino kun Francois Debre kaj Michel Parbot, korespondantoj de "Agence Francaise des Images" kaj parolis pri la rilatoj inter Ĉinio kaj Francio kaj la aktuala internacia situacio. La enhavo de lia parolo tekstas jene:

Estas bonveniginde, ke en la nuna mal-kvieta situacio de la mondo, la Franca Registara Delegacio estrata de lia Ministra Moŝto Bettencourt vizitas Ĉinion kaj, per interparoloj inter ambaŭ flankoj, la bonaj rilatoj inter Ĉinio kaj Francio disvolviĝis pluapaŝe.

Kredeble oni memoras, ke la bonaj rilatoj inter Ĉinio kaj Francio estis fonditaj antaŭ pli ol ses jaroj sub la persona zorgado kaj instigo de Prezidanto Maŭ Zedong kaj Generalo de Gaulle.

Lia Ministra Moŝto Bettencourt je multaj okazoj menciis, ke la franca registaro sub la gvido de lia Prezidanta Moŝto Pompidou daŭre sekvas la eksteran politikon de Generalo de Gaulle. En sia fama parolado farita dum sia vizito al Kamboĝo en septembro de 1966, Generalo de Gaulle esprimis en eksplicitaj vortoj sian firman subtenon al la politiko de sendependeco, paco kaj neŭtraleco de la kamboĝa ŝtatestro Samdek Norodom Sihanuk, kaj opiniis, ke la usonaj trupoj devas sin fortiri el suda Vjetnamio, por ke la vjetnama popolo solvu sian problemon per si mem.

Laŭ la nuna situacio, la agresa armeo de Usono kaj ĉiuj ĝiaj lakeaj trupoj devas sin retiri tute el la tri hindoĉiniaj landoj, por ke la popoloj de tiuj landoj solvu siajn problemojn per si mem. La usona agresa armeo devas retiriĝi el suda Koreio por ke la korea popolo realigu la aspiron de reunigo de sia patrolando. La usona agresa armeo devas retiriĝi el Tajvan-provinco kaj Tajvan-markolo de Ĉinio. La ĉina popolo nepre liberigos Tajvan. En pli vasta senco, ĉiuj usonaj armitaj fortoj kaj la armitaj fortoj de aliaj landoj devas retiriĝi al siaj propraj landoj el ĉiuj teritorioj de ili okupataj, por ke la popoloj de ĉiuj landoj ĝuu la rajton solvi siajn problemojn per si mem, sen ajna minaco aŭ interveno de eksteraj fortoj.

Kvankam Ĉinio kaj Francio estas diferencaj en socia sistemo, tamen, ili ambaŭ arde amas sendependecon kaj oponas kontraŭ kontrolado kaj interveno truditaj de grandaj potencoj. Hodiaŭ troviĝas unu aŭ du "superaj" potencoj en la mondo, kiuj ĉiam provas subpremi aliajn per forto, tirani la malfortajn kaj malgrandajn kaj konkuri pri monda hegemonio. La danĝero de eksplodigo de mondmilito fare de grandaj potencoj ankoraŭ ekzistas kaj ni nepre devas nin prepari. Sed, epoko jam antaŭeniris kaj ĉiam pli granda nombro da poloj en la mondo jam vekigis aŭ estas vekigantaj. La tagoj, kiam grandaj potencoj decidis la sorton de la mondo, jam forpasis por ĉiam. Nepre devas esti detruita la superstiĉo de timo al grandaj potencoj!



# Kreado de Alta Produkto de Kotonono kaj Greno Fare de Jangliuhjue-brigado

ĈE la norda bordo de la Flava Rivero sur Bohaj-ebenejo de Ŝandong-provinco troviĝas fame konata Jangliuhjue-brigado. Memkonscie persistante en la vojo de sinapogo sur propraj fortoj kaj penema lukto en malfaciloj, la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de la brigado ligas sian vilaĝeton konsistantan el 36 familioj kun la vasta patrolando, kaj lokas sian terkulturadon en la gigantan torenton de la socialisma revolucio kaj konstruado de sia patrio. En sep sinsekvaj jaroj ili akiris altan produkton tiel de greno kiel de kotonono, kaj en kvar sinsekvaj jaroj ili kontribuis kaj kotonon kaj grenon al la ŝtato.

Menciante la atingojn de Jangliuhjue, oni nature ekpensis pri la "tri popularaj artikoloj". En la jaro 1963, Jang Bingkun, komitatano de la partia filio de la brigado, aĉetis de la provinca urbo kelkajn ekzemplerojn da "tri popularaj artikoloj". Sed ili ne estis sufiĉaj por kontentigi la bezonon de ĉiuj. Kion fari? La partia filio tuj organizis kelkajn gejunulojn kun relative alta klereco por transskribi la artikolojn vorton post vorto sub kerosena lampo kaj poste legi al ĉiuj pogrube. Ĉiu el la vortoj de Prezidanto Maŭ varmigis la koron de la jangliuhjue-anoj.

Por kio kamarado Ĝang Side prenis sur sin la laboron prepari lignokarbon? Por kio kuracisto Bethune ne trovis la vojaĝon longa por veni al Ĉinio fore de miloj da mejloj? Ili tion faris ja por la revolucio! Do ankaŭ ni devas terkulturi por la revolucio.

La nobla idealo terkulturi por la revolucio komencis burĝoni en ilia koro.

Sed, por efektiviĝi la idealon, oni devas forigi ĉian individuisman kalkulon. Sekve, la batalo

por kolektivo kontraŭ egoismo ofte iris en tiu vilaĝeto, en la ideologio de ĝiaj loĝantoj.

En 1963, la pomua produktokvanto de sensemita kotonono de la brigado atingis 156 ĝinojn. Konsiderante pri ilia alta produkto de kotonono pro bona kulturado, en 1964 la gubernia instanco asignis al ili la taskon generi bonspeciajn semojn. Rezentanto de la gubernio diris: "Kvankam altprodukta estas la kotonono '933', tamen ne tre bona estas ĝia kvalito, tial ĝi estas malpli utila por la ŝtato; kvankam malaltprodukta estas la kotonono '1818', tamen ĝia kvalito estas alta, tial ĝi estas pli utila por la ŝtato. Nun ni donas al vi la semojn, do vi garantiu planti '1818' sur ĉiuj viaj kotonkampoj."

La tasko estigis diskuton pri la interesoj de la ŝtato kaj tiuj de la kolektivo. Se oni plantos "1818" anstataŭ "933", la kolektivo akiros malpli altan enspezon pro reduktiĝo de produktokvanto. Kion fari? Vespere, 6 kompartianoj sidiĝis runde kaj interkonsiliĝis pri la tasko. La maljuna sekretario de la partia filio Jang Venkuj, pioniro dum organizado de interhelpaj grupoj, gvidis ĉiujn lerni la "tri popularajn artikolojn". La spirito de Ĝang Side ekskluzive kaj senrezerve servi al la popolo tuŝis ĉies koron. Post diskutado la partianoj venis al unueca opinio, ke planti kotonon celas plenumi la bezonon de la ŝtato sed ne akiri monon. Kiel membroj de la Komunista Partio de Ĉinio, oni ne devas vidi nur sian vilaĝon, sed nepre devas plenumi la taskon komisiitan de la Partio. Fine ili decidis planti sur ĉiuj kotonkampoj "1818" sen enmiksiĝo de unu sola alispeca semo.

La decido de la partia filio ricevis aprobon de la vastaj amasoj de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj. Ĉu viroj aŭ virinoj,

*La partia filio de Jangliuhjue-brigado interkonsiliĝas pri efektiviĝo de la produkta plano.*



ĉu junuloj aŭ maljunuloj, ĉiuj de la brigado partoprenis la semadon, kaj en daŭro de unu semajno plenumis la taskon.

Sed, malfavoris la vetero. Tiu jaro estis la jaro en kiu kotonon plej multe suferis de naturaj katastrofoj. En printempo, kiam la kotonplantoj preskaŭ elteriĝis, ili estis atakitaj de pluvego. La komunumanoj ĉiuj iris al la kampoj, formovis la terkrustojn kaj elsavis la plantidojn unun post alia. Kiam venis somero, neatendite pluvegis en sinsekvaj tagoj, kaj la forte kreskantaj kotonplantoj dronis en akvo. La plantoj estis malorde kuŝigitaj aŭ klinigitaj. Kontraŭ la katastrofo, la jangliuhjue-anoj denove estis mobilizitaj por unuanime sin ĵeti en la batalon por starigo de la plantoj. Malriĉkampanino-komunumanino Hu Hiujun alrapidis kun nombro da virinoj sub sia gvido. Ŝi diris: "Se ni havas firman decidon, ni ne timas malfacilon, kiom ajn granda ĝi estas. Starigi unu plian kotonplanton signifas fari unu plian kontribuon al la ŝtato." Sekvante ŝian ekzemplon, la virinoj ekstarigis unu planton post alia, vadante en la koto ĝismaleole profunda. La komunumanoj penlaboris pli ol dek tagojn kaj fine venkis la katastrofon de koto, per tio garantiis la efektiviĝon de la ŝtata plano generi bonspaciajn kotonsemojn kaj akiris bonan rikolton kun pomua produktokvanto de 132 ĝinoj da sensemigita kotonon.

En 1966, en Jangliuhjue iris intensa batalo inter kolektivismo kaj individuismo. Printempe, la gran-

da instrukcio de Prezidanto Maŭ "sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo" komunikigis al Jangliuhjue. La partia filio de la brigado foj-refoje lernis la instrukcion kaj interkonsiliĝis pri ĝia efektiviĝo. Ili opiniis, ke kvankam Jangliuhjue liveras kotonon al la ŝtato, tamen en provizo de greno ĝi dependas de la ŝtato, kaj tio ne konformas al la spirito de la instrukcio. Tial, la plej bona ago por efektiviĝi la instrukcion de Prezidanto Maŭ estas kontribuo ne nur de kotonon sed ankaŭ de greno al la ŝtato, anstataŭ dependo de ĝi en grenprovizo. Sekve dum komuniko de la instrukcio al la komunumanoj, ili elmetis la problemon pri memprovizo de greno.

La problemo tuj estigis diskuton.

Malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj diris: "Ni jangliuhjue-anoj ne devas dependi de la ŝtato en grenprovizo."

Iuj diris: "Estas tute racie, ke ni vendas al la ŝtato kotonon, dum la ŝtato provizas nin je greno."

"Kion ni faros, se okazos milito? Kion ni faros, se nin trafos katastrofo?" tuj demandis malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj.

Kaj iuj aliaj diris: "Tiam do ni pli multe kulturu grenon kaj malpli multe kotonon!"

La partia filio montris eksplicite: "La areo de kotonkampoj neniom devas esti reduktita, kaj



*Komunumaninoj zorge selektas kotonsemojn.*

tamen en tiu kondiĉo ni devas fari samtempe du kontribuojn!”

Konsciante ke la disputo inter la komunumanoj spegulas la batalon inter kolektivismo kaj individuismo, la partia filio opiniis, ke ĝi devas inspiri ĉiujn al konscio por solvi la problemojn en ideologio. Ĝi do organizis la komunumanojn foje kaj refoje studi instruojn de Prezidanto Maŭ, kondukis ĉiujn al rememoro pri la pasintaj suferoj kaj penso pri la nuna feliĉo kaj edukis ilin per avangardaj faroj de Daĝaj.

Rememorante pri la pasinteco kaj pensante pri la nuna feliĉo, Jang Huj-en, maljuna malriĉkamparano multe suferinta en la malnova socio, tre emociiĝis. Kiam iuj proponis kulturi malpli multe da koton sed pli multe da greno, li tuj diris signifoplene: “Nia koton sed estas inkluzivita de la ŝtata plano. Kaj simile al teksado bona ŝtofo ne povas esti teksita eĉ pro manko de unu fadeno!”

Per la parolo li lumigis ĉies koron, kaj ĉiuj ekbruis inter si. Iuj diris: “En terkulturado ni ne devas konsideri nur pri ni mem, sed devas zorgi en la koro pri la manĝado kaj vestado de la popolo de la tuta lando.” Aliaj diris: “Efektivigi samtempe du kontribuojn per kulturo de malpli multe da koton kaj pli multe da greno estas agmaniero de maldiligentuloj sed ne spirito de malmolostaj viroj.” Fine ĉiuj unuanime decidis batalakiri altan produkton sur meznombre 0.45 muo da grenkampo por

ĉiu homo por fari samtempe du kontribuojn.

En tiu jaro Jangliuhjue akiris altan produkton kaj en koton kaj en greno. En la tuta brigado, la pomua produktokvanto de sensemigita koton de la 225 muoj da kotonkampoj estis 120 ĝinoj, kaj pli ol 27,000 ĝinoj da sensemigita koton estis venditaj al la ŝtato; la pomua produktokvanto de greno de la 71.5 muoj da grenkampoj estis 1,150 ĝinoj, kaj en la kondiĉo de meznombre 0.45 muo da grenkampo por ĉiu homo estis venditaj al la ŝtato 10,000 ĝinoj da greno. Fine realiĝis la deziro de la jangliuhjue-anoj samtempe fari du kontribuojn.

Tiu jaro estis turnopunkto por Jangliuhjue. Ĝis 1969, en la kondiĉoj ke la kotonkampoj okupis

70% de la totala agra areo kaj ĉiu homo disponis meznombre 0.45 muon da grenkampo, jangliuhjue-anoj jam efektivigis samtempe du kontribuojn en kvar sinsekvaj jaroj.

Kiel oni akiris altan produkton de koton kaj greno?

Iuj diris, ke tio estis akirita dank’ al la favoraj naturaj kondiĉoj de Jangliuhjue. Sed, antaŭ 1963, oni jene ĝin priskribis: En Jangliuhjue, samtempe troviĝas tereno alta kvazaŭ monto kaj tereno malalta simila al bufa lago, kaj la kampojn minacas inundo kaj sekeco. Sur ĉiu parcelo troviĝas pli-malpli multe da alkalo.

Aliaj imagis al si, ke tio rezultas el la multeco de kemia sterko kaj pruntedonita mono de la ŝtato al Jangliuhjue. Sed la fakto estis, ke de post sia elekto kiel ruĝflaga unuo, ĝi neniam petis eĉ unu ekstran ĝinon da kemia sterko aŭ prunteprenis eĉ unu groŝon de la ŝtato.

Kaj triaj pensis, ke Jangliuhjue estis riĉa jam en la pasinteco. Sed la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Jangliuhjue neniam forgesos la suferojn en la malnova socio. Tio, kion ili manĝis, estis brano miksitaj kun legomo. Tio, kion ili trinkis, estis sal-alkala akvo. Ili laboris aŭ kiel farmuloj, aŭ kiel kulioj.

Jangliuhjue povis atingi altan produkton kaj en koton kaj en greno kaj fari samtempe du kon-



tribuojn ja dank' al nenio alia ol sinapogo sur pro-  
praj fortoj kaj penema lukto en malfaciloj, kiujn  
janglehujue-anoj efektivigis laŭ la instruoj de Pre-  
zidanto Maŭ.

En 1963, por reformi la malfavorajn naturajn  
kondiĉojn, la partia filio de la brigado elmetis jenan  
demandon antaŭ la komunumanojn: Ĉu la naturo  
direktu nin aŭ ni direktu la naturajn fortojn?

La temo vekis la multjaran deziron de la mal-  
riĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj.  
Ili diris: "Por batalakiri altan produkton tiel  
en kotono kiel en greno, ni devas unue venki seke-  
con, inundon pro abundo de pluvo kaj alkalecon  
de tero. Nia Janglehujue nepre devas transformi  
la naturon." Ĝuste en vintro de tiu jaro, ili ko-  
mencis fosi kanalojn por nepre alkonduki la akvon  
de la Flava Rivero por irigacio.

Sub vintra frostego glaciigis la vasta tero. La  
maljuna sekretario de la partia filio Jang Venkuj  
gvidis komunumanojn veni al la konstruejo, kaj  
tuj komenciĝis la laboro. Kun tuta forto oni povis  
fosi per pioĉo ĉiufoje nur malgrandan kavon. De-  
koj da homoj laboregis tutan tagon, sed fosis nur  
kelkajn kubmetrojn da tero. Tion alfrontante iuj  
ŝanceliĝis.

La maljuna sekretario Jang Venkuj tamen in-  
terese rakontis pri la Malsaĝa Avo. Fine li diris:

"Se Malsaĝa Avo kun liaj familianoj kapablis trans-  
lokigi la montojn, ĉu ni janglehujue-anoj eĉ ne  
kapablus fosi kelkajn irigaciajn kanaletojn? Nur  
se ni havas decidemon, ne ekzistas por ni nevenkebla  
malfacilo!" La heroo figuro de la Malsaĝa Avo  
kuraĝigis la komunumanojn. La revolucia spirito  
de la maljuna sekretario edifis ĉiujn. Ili diris:  
"Por la revolucio, ni marŝu antaŭen senreturne,  
spite al malfacilo kiom ajn granda!"

La kompakta frostigita tero estis malfacile  
fosebla por pioĉoj. Ili do alportis pintigitajn  
ŝtalstangojn por sin helpi. Kiam la konstruejon  
kovris neĝo, ili ĝin forbalais kaj daŭrigis la laboron.  
Ili diris: "En Janglehujue ne estas vintro, ni daŭri-  
gas la laboron spite al profunde frostigita tero.  
Por alta produkto de kotono kaj greno ne gravas  
por ni eĉ ostorompigo."

En 1964, kiam Prezidanto Maŭ elmetis la gran-  
dan alvokon "Ierni de Daĝaj en agrikulturo", pli  
vigligis la revolucia spirito de la janglehujue-anoj  
en la batalo kontraŭ la naturo. Post penega luk-  
tado en ses sinsekvaj jaroj ili finfosis tri irigaciajn  
kanalojn kun 20 branĉoj, nivelis la altaĵojn, plenigis  
la bufan lagon kaj ebenigis kampojn. En ses jaroj  
ili entute fosis pli ol 60,000 kubmetrojn da tero.  
El la viraj kaj virinaj laborfortoj de la tuta brigado,  
ĉiu fosis meznombro ĉ. 1,000 kubmetrojn. Fine

*Elekti la plej bonan grenon por vendi ĝin al la ŝtato.*



alkondukiĝis akvo de la Flava Rivero. Dank' al lavo de la alkalaj kampoj kaj jar-post-jara forskrapo de alkala terkrusto, multe reduktiĝis la katastrofo. La kampoj de la tuta brigado estis turnitaj en stabile altproduktajn kampojn, kiuj povas esti irigacia-taj dum sekeco kaj drenataj dum inundo pro pluvego.

Dum la pasintaj sep jaroj, la brigadon trafis granda sekeco en tri sinsekvaj jaroj, granda inundo pro pluvego en unu jaro kaj dufoje hajloj. Sed, la naturaj katastrofoj neniel povis subigi la jangliuhjue-anojn. Ili diris brave: "Kvankam troviĝas katastrofoj, tamen kiam vi leviĝas al lukto kontraŭ ili, ili tuj foriĝos. Kun la brila suno en la koro por fari revolucion ni garantias abundan rikolton eĉ en katastrofa jaro."

Dank' al sinapogo sur propraj fortoj kaj penema luktado en malfaciloj fare de la jangliuhjue-anoj, ne nur iliaj kontribuoj al la ŝtato ĉiam pli multiĝis, sed ankaŭ ilia kolektiva ekonomio senĉese pligrandiĝis kaj plifortiĝis. Per parto de sia akumulita mono, ili aĉetis entute 12 maŝinojn por drenado, irigacio, semado kaj prilaborado de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj. La komuna akumulaĵo inkluzive la fiksajn havaĵojn kaj la monon deponitan en la ŝtata banko atingis 140,000 *yuan*, t.e. meznombro ĉ. 4,000 *yuan* por ĉiu el la 36 familioj. En la nuna Jangliuhjue, antaŭ kaj post la domoj, ambaŭflanke de la vojoj, ĉie verdas poploj kaj salikoj; sur la ebenaj kampoj neĝe blankas kotonlanugo el krevintaj fruktoj. Tute aliĝis ĝia fizionomio.

Alte leviĝis la ruĝa flago de Jangliuhjue. La supera instanco plivastigas ĝian sperton. Multaj frataj unuoj alvenas por lerni. Iuj unuoj havantaj relative multajn malfacilojn sin turnis al ĝi por peti helpon en spirito kaj materio.

Kion fari? En la "tri popularaj artikoloj" de Prezidanto Maŭ la jangliuhjue-anoj trovis ĝustan respondon. Ili diris: "Eĉ se nian Jangliuhjue tute 'kovrus' abundaj greno kaj kotonono, kiom grandan kontribuon ni povus fari al la ŝtato? Nia Jangliuhjue sola ja ne povas atingi komunismon!" Ĝuste sub la direkto de tia nobla ideo Jangliuhjue faris decidon doni ekzemplon por la aliaj frataj unuoj en la ĉirkaŭaĵo. Ĝi donis senegoismajn helpon al ili tiel en materio kiel en ideologio.

En 1968, kiam la tritiko estis rikoltita, komunumanoj de la brigado intense sin okupis tage kaj nokte pri plugado de la tritikaj kampoj kaj semado de maizo. Sed en tiu ŝlosila momento, konsiderante

pri la nesufiĉeco de la homfortoj kaj brutfortoj de la tria produktgrupo de Ĉengguan-komunumo, la kadroj de Jangliuhjue tuj senbrue sendis homojn kun kvin bovoj tirantaj du dusokajn plugilojn al la grupo por ĝin helpi en plugado kaj erpado, tiel ke ĝi ĝustatempe semis maizon.

En printempo de 1968 okazis serioza sekeco. La brigado pumpis akvon per sia 12-ĉevalpova dizelo por irigacio. Ĝuste tiam Tangia-produktgrupo pli ol 10 liojn fora sin turnis al ĝi por peti helpon, ĉar la pli ol 180 muoj da tero de tiu produktgrupo suferis de serioza sekeco kaj estis minacata de neebleco de ĝustatempa semado. La brigado tuj cedis la maŝinon al Tangia kaj samtempe sendis du maŝinistojn por lukti tie tage kaj nokte. Kaj la brigado mem ankaŭ mobilizis aliajn laborfortojn porti akvon por irigacio, krom pumpado per elektraj motoroj. Iuj diris: "Ĉu tio ne signifas mempenigon?"

"Por la revolucio ni ja volentas mempenigi!" respondis la jangliuhjue-anoj.

Iujare, la kadroj de Jangliuhjue-brigado rimarkis, ke venas la tempo por plua sterkado al kotonkampoj de aliaj tri brigadoj. Sed sciiginte ke pro manko de monrimedoj la tri brigadoj havas malfacilon por aĉeti kemian sterkon, ili meminciate liveris parton de sia kemia sterko al ili.

Multaj estis tiaj faroj. Sed, la plej kortuŝa estis tio, ke ili donis helpon al Ŝimiaŭ-brigado.

Jangliuhjue kaj Ŝimiaŭ estas najbaroj, kies terenoj intertuŝiĝas. Sed malsame kreskis la plantoj de la du vilaĝoj. La kadroj de Jangliuhjue-brigado kore volis helpi Ŝimiaŭ kuratingi ilian brigadon.

Iun someron, revenante de la komunuma administrado post kunveno, Jang Bingji, la tiama brigadestro de Jangliuhjue, preterpasis kotonkampon de Ŝimiaŭ-brigado. Komunumanoj de la lasta estis donantaj aldonan kemian sterkon. Li trovis, ke ili agis malĝuste, donante saman kvanton da sterko al kotonplantoj bone aŭ malbone kreskantaj. Li do turnis sin al kadroj de Ŝimiaŭ, rekomendis al la lastaj la sperton de sterkado de sia brigado, kaj gvidis komunumanojn de Ŝimiaŭ al kelkaj kotonkampoj de malsamaj tipoj por demonstri al ili kiel sterki. De tio tre kortuŝiĝis la kadroj kaj komunumanoj de Ŝimiaŭ.

Nun ĉirkaŭ Jangliuhjue aperis multaj produktaj brigadoj kun abunda rikolto tiel en kotonono kiel en greno.




# Elektraj Stacioj Starigitaj ĉe Montfluejoj kaj Riveroj

**L**A gubernio Luĉuan situas en montetara regiono sudoriente de Guanghi. Ses riveroj havas sian fonton en la gubernia teritorio. Kvankam sufiĉe riĉa estas tie la hidraŭlika fonto, tamen, pro la alta situo de la kampoj, plejparto de ili dependas de pluvakvo. Antaŭ la Liberiĝo, la montoj estis sterilaj kaj la akvo vane forfluis. En bona jaro la meznombra produkto de greno estis nur ĉirkaŭ 150 kilogramoj po muo.

En 1958, sub la brilo de la ĝenerala linio elmetita de Prezidanto Maŭ “**streĉi plene la energion kaj**

**strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie**”, kun alta batalvolo la popolo de Luĉuan levis altan tajdon de vasta entreprenado de akvoutiligo konstrui montajn lagojn, akvokonservejojn kaj kanalojn. Tiel la irigaciaj kampoj de la tuta gubernio plivastiĝis de pli ol 30,000 muoj en la komenca periodo post la Liberiĝo ĝis 170,000 muoj. Sed, estis ankoraŭ 70,000 muoj da kampoj neatingeblaj de la akvo el montlagoj kaj akvokonservejoj. Por ili necesis levi la akvon per energio. Tial, la vastaj amasoj de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj pro-

*Malgranda montregiona elektrostacio en konstruado*





ponis utiligi la akvofalon de Dongŝan por starigi elektrajn staciojn. Sub la apogo de revoluciaj kadroj en la gubernia komitato de la Partio, ili kolektis monrimedon de pli ol 500,000 *yuan* dank' al la kolektiva forto kaj sendis pli ol 4,500 personojn al Dongŝan por la konstruado.

Kiam oni konstruis la elektran stacion, la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj energie oponis la tri ruĝajn flagojn de la ĝenerala linio de la Partio pri socialisma konstruado, la granda antaŭensalto kaj la popola komunumo profitante la provizorajn malfacilojn de la nacia ekonomio, kaj levis la diablan venton de "deĉevaliĝo". Ankaŭ iuj en la gubernio eĥis, ke "tro rapide estas komencitaj la laboroj de akvoutiligo kaj starigo de elektraj stacioj" kaj proponis "malkonstrui akvokonservejon por reakiri la kam-

pojn". Tiam la revoluciaj gvidaj kadroj de la gubernio serioze studis la instruon de Prezidanto Maŭ: "Ŝajne estas diferenco nur en unu vorto, unu por deĉevaliĝo kaj alia por surĉevaliĝo, sed en tio montriĝas malakordo de du linioj." Ili diris: "Deĉevaliĝo" signifas retroiron, kaj nur per "surĉevaliĝo" oni povas antaŭeniri. Ili plenforte subtenis la popolon en vasta entreprenado de akvoutiligo kaj elektraj stacioj por daŭre antaŭeniri grandpaŝe laŭ la direkto de socialismo. De 1959 ĝis 1964, la Dongŝan-a Hidraŭlika Elektrejo konstruis por si tri generatorajn kompletojn kun totala kapacito de 1,044 kilovatoj kaj fariĝis elektra bazo por la gubernio.

La finkonstruo de tiu elektra stacio multe stimulis la fervoron de la popolo de Luĉuan en entreprenado de akvoutiligo kaj elektraj stacioj. Ĉelutang-a

*Membroj de la Revolucia Komitato de Luĉuan-gubernio kune kun malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj enketas akvofontojn por ellabori kompletan planon pri starigo de malgrandaj hidraŭlikaj elektrostacioj.*



Produktgrupo de Mapo-komunumo trahakis rok-murojn kaj fosis kanalon longan pli ol du liojn post pli ol dumonata batalo per tridek kelkaj homoj. Per tio ili ebligis irigaciadon al pli ol 20 muoj da kampoj kaj utiligante la diferencon de akvoniveleoj konstruis malgrandan elektran stacion, kaj tiel ŝanĝis la postrestintan fizionomion de la grupo. Dek naŭ malriĉkamparanaj familioj de Ĝajtoŭ-a Produktgrupo de Miĉang-komunumo luktis pli ol sep monatojn, fosis proksimume 800-metran kanalon kaj konstruis malgrandan elektran stacion per mem kolektitaj monrimedoj. Dank' al tio estas irigaciataj kampoj kaj mekanikigita la prilaboro de agrikulturaj kaj flankaj produktaĵoj, tiel ke tute noviĝis la aspekto de tiu monta vilaĝo. Tiuj malgrandaj elektraĵoj bezonas ne multajn laborfortojn, nek grandan investon, nek longan tempon. Pro rapide videbla utilo ili estas tre bonvenaj al la komunumanoj. Sed, iuj el la malnova partia komitato de la gubernio, kiujn influis la kontraŭrevolucia linio de Liu Ŝaŭki, ne prenis tiujn malgrandajn elektraĵojn en sia konsidero kaj tutkore ĉasis grandecon kaj modernecon. Ili invitis de aliaj lokoj iujn "specialistojn" kaj "aŭtoritatulojn" por fari irigacian kaj hidroelektran projekton de riverbaraĵo ĉe Datong-brigado de Dakiaŭ-komunumo. Pro apartiĝo de la projekto disde la realaj kondiĉoj, la konstruado finiĝis per malsukceso.

La flamanta fajro de la Granda Proletara Kultura Revolucio forbruligis la burĝaran komandejon estratan de Liu Ŝaŭki. Alte tenante la standardon de revolucia amasa kritiko, prenante la malsukceson en la konstruado kiel vivan ekzemplon, la vastaj amasoj de revoluciaj kadroj kaj amasoj de Luĉuan forte kritikis la penson "ĉasi grandecon kaj modernecon", tiel ke ĉiuj komprenis pli profunde, ke persistante pri la orientilo "entrepreni ĉefe malgrandajn konstruojn", vaste starigante malgrandajn hidroelektraĵojn per siaj propraj fortoj, oni povos iom post iom efektiviĝi elektrigon de la kamparo. Post la revolucia amasa kritiko, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de Datong-brigado de Dakiaŭ-komunumo plie rompintis superstiĉon kaj liberigis penson. Ili mem projektis kaj sukcese starigis post penado en du sinsekvaj vintroj kaj printempoj elektran stacion kun kapacito de 48 kilovatoj kaj kapablo irigacii pli ol 1,500 muojn da kampoj. La du malsamaj rezultoj kun akra kontrasto de la du malsamaj linioj plej draste proklamis bankroton de "ĉaso de grandeco kaj moderneco". Tiam vigle leviĝis nova alta tajdo de amasa entreprenado de akvoutiligaj konstruoj kaj elektraĵoj en

la tuta Luĉuan. Ekde la Granda Proletara Kultura Revolucio la totala kapacito de la malgrandaj hidraŭlikaj elektraĵoj starigitaj de la popolo de Luĉuan superis 2,000 kilovatojn, kiu estas pli granda ol la totala kapacito de tiuj starigitaj en ok jaroj antaŭ la granda kultura revolucio.

Nun, en la tuta gubernio, estas starigitaj 70 malgrandaj hidraŭlikaj elektraĵoj kun totala kapacito de pli ol 3,000 kilovatoj, 49 elektraĵoj pumpstacioj, 45 pumpstacioj de akvaj radoj, 42 malgrandaj akvokonservejoj, pli ol 5,400 malgrandaj lagoj, kaj kanaloj kun totala longo de pli ol 2,300 lioj. Kombino de irigacio kaj hidraŭlika elektro formas grandiozan bildon en la ebenejoj kaj montregionoj de Luĉuan: Elektraĵoj, akvokonservejoj kaj montlagoj dise lokiĝas kiel steloj, kanaloj kaj riveroj interkruciĝas kiel la linioj de ŝaktabulo, kaj irigacia sistemo por agroj per konservo, alkonduko kaj levo interkomunikas kiel reto. 85% de rizkampoj de la gubernio fariĝis stabile altproduktaj tiel en sekeco kiel en pluva troabundeco. Riĉaj rikoltoj de grena produkto estis akiritaj en sinsekvaj jaroj. En 1964, la meznombra pomua grenprodukto estis 413 kilogramoj, kaj en 1969 ĝi kreskis al 500.

Dank' al vasta utiligo de hidroelekto, multaj laborfortoj ŝparitaj en akvumado kaj batalo kontraŭ sekeco estas transuzataj por kulturebliĝi virgan teron kaj plivastigi agrojn. De pli ol unu jaro en la tuta gubernio oni jam transformis pli ol 35,000 muojn da tero en agrojn. Tiu nombro egalas al 10% de la agroj antaŭe havitaj. Oni ankaŭ uzas hidroelektron en pistado kaj pulvorigado de sovaĝaj vegetaĵoj kaj malplenaj grajnoj por uzi ilin kiel nutraĵon de porkoj kaj tiel multe disvolvis porkobredadon. Pli da porkoj — pli da sterko. Tio akcelas disvolvon de agrikulturo.

La starigo de malgrandaj hidraŭlikaj elektraĵoj liveras malkaran energion al loka industrio. En pli ol dek jaroj estas fonditaj en la gubernio 52 malgrandaj fabrikoj, inkluzive tiujn por mekanikaĵoj, agrikulturaj instrumentoj, fosforaj sterkoj, insektomortigiloj, cementoj kaj gisaĵoj. La fabriko de fosforaj sterkoj produktas 20,000 tunojn da sterko jare, kiuj kontentigas la bezonojn de la gubernia agrikulturo. La loka industrio forte subtenas la agrikulturon, la gubernio kontribuas ĉiam pli multe al la ŝtato. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkampanoj ĝoje diris: Maŭzedongpenso brilas kvazaŭ la suno; ŝanĝiĝas kaj la homa penso kaj la tero. Starigis ĉie elektrostacioj; multe kreskas agrikulturo kaj industrio.



# Terkulturado laŭ Sciencia

## Maniero en la Kvara Produkta

### Grupo de Bajjanghe

**L**A loko, kie troviĝas la kvara produkta grupo de Bajjanghe, estis nomata en la pasinteco “malriĉa Hiavan”. En la lastaj kelkaj jaroj, precipe en la Granda Proletara Kultura Revolucio, giganta ŝanĝiĝo okazis al tiu produkta grupo. Kiam ĝiaj membroj ekparolas pri tio, ili ĉiam elkore laŭdas la maljunan grupestron Li Ĝiki.

En novembro de 1962, Li Ĝiki revenis de Jumen post kunveno kaj alportis *Elektitajn Verkojn de Maŭ Zedong*. Kune kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj li serioze studis verkojn de Prezidanto Maŭ, kaj ju pli li studis, des pli klariĝis lia direkto kaj des pli grandiĝis lia laborenergio. Li firme diris al ĉiuj: “Ni nepre turnos la vortojn de Prezidanto Maŭ en fortojn por translokigi montojn kaj plenigi maron. Se la Malsaĝa Avo povis translokigi montojn, do ni nepre povos reformi ‘malriĉan Hiavan’.” Tage li kune kun komunumanoj faris esploron sur ĉiu parcelo kaj ellaboris planon por grundreformado; kaj vespere li vizitis familion post familio propagandante la spiriton de montotranslokigo fare de la Malsaĝa Avo por kuraĝigi la batalvolon de la amasoj en reformado de “malriĉa Hiavan”. Por reformi grundon li kondukis la amasojn forporti salalkalan tertavolon kaj akvotralasantan sablon. Post streĉa batalo en unu vintro kaj unu printempo ili reformis pli ol 30 muojn da kampoj.

En 1963, kiam Prezidanto Maŭ elmetis la grandan instrukcion “Klasbatalo, porprodukta batalo kaj scienca eksperimentado estas la tri grandaj revoluciaj movadoj por konstrui potencon socialisman landon”, Li Ĝiki kune kun komunumanoj ripetfoje studis kaj serioze pridiskutis ĝin, kaj dank’ al tio plie klariĝis ilia penso. Li diris al komunumanoj:

“Ĉiu vorto de Prezidanto Maŭ trafas nian koron. Ni devas firme teni la klasbatalon kaj produktan batalon, kaj ni kampuloj ankaŭ devas fari sciencon eksperimentadon.”

Terkulturado laŭ scienca maniero estis tute nova afero en la kvara produkta grupo de Bajjanghe, kaj ankaŭ Li Ĝiki neniam tion faris antaŭe. Sed kun Maŭzedongpenso kiel vojkondukanto kaj sub la subteno de la vastaj amasoj, Li Ĝiki havis plenan memfidon. Konsiliĝinte kun aliaj kadroj de la grupo li starigis sekcion de scienca eksperimentado, kiu komencis fari sciencajn eksperimentojn surkampe. Sed pro manko de sperto, ili malsukcesis en la unua jaro.

Antaŭ la malsukceso Li Ĝiki ne ŝanceliĝis. Li serioze resumis la sperton kaj lecionojn kune kun la amasoj kaj sekve prospere disvolviĝis la scienca eksperimentado en la tuta grupo.

Foje, dum printempa semado, inter la amasoj estiĝis disputo pri la taŭga kvanto de semitaj grajnoj. Li Ĝiki pensis en si: Malsama specio havas malsamajn karakterojn, tial la taŭga denseco de semitaj grajnoj devas esti malsama. Por trovi ĝustajn donitaĵojn de denseco de semitaj grajnoj de ĉiu specio li faris detalan esploron pri diversaj grundoj kaj specioj de semoj. Vintre, li laboris tage same kiel komunumanoj, kaj kalkulis nokte tritikajn semojn por koni la pezon de mil grajnoj, printempe, li tage semis sur kampo kaj faris eksperimenton pri la kvanto de semitaj grajnoj de ĉiu sulko kaj nokte antaŭkalkulis la pomuan nombron de plantidoj kaj pomuan produktokvanton. Post trijara eksperimento li fine akiris donitaĵojn de racia densa plantado por malsamaj grundoj kaj malsamaj





*Li Ĝiki kaj komunumanoj esploras la novan specion propramane elkulturitan de li.*

specioj, konis la leĝojn de la kreskado de tritiko kaj fabo kaj tiel efike pliiĝis la produktokvanton de grenoj.

En la pasinteco oni opiniis olean linon plantaĵo de malalta produkto. Post serioza esploro Li Ĝiki kune kun komunumanoj ŝanĝis la malnovan kutimon de dissemado sen sterkado en ĝia kulturado kaj tiel pliiĝis ĝian pomuan produktokvanton de pli ol 100 ĝinoj ĝis 350 ĝinoj en tri jaroj.

En la pasinteco sovaĝa aveno estis granda malutilo por agrikultura pliprodukto de la kvara produkta grupo de Bajjanghe. Post serioza esplorado kaj pena praktikado Li Ĝiki ellaboris, kune kun komunumanoj, serion da metodoj por ekstermi sovaĝan avenon, kaj tiel venkis la malutilan herbaĉon kaj multe altigis la produktokvanton de grenoj.

Ĉu en printempo, somero, aŭtuno aŭ vintro, ĉu dum ventado aŭ neĝado, Li Ĝiki ĉiam persistis resti inter la amasoj, donante bonan ekzemplon en laboro kaj kun rigora scienca sinteno kaj spirito de peno kaj praktikemo, analizis kontraŭdirojn kaj

solvis problemojn. Tiamaniere post kelkjara laborado de Li Ĝiki kaj la amasoj estis efektive ĝenerala apliko de bonspaciaj grensemoj en la tuta grupo, kaj la pomua produktokvanto jam atingis pli ol 500 ĝinojn. Tamen Li Ĝiki ne kontentiĝis pri tio. Li opiniis: Kompare kun Daĝaj la ŝanĝigo de "malriĉa Hiavan" estas nemenciinda. Tio kion ili faris estas nur unua paŝo sur la vojo de terkulturado laŭ scienca maniero montrita de Prezidanto Maŭ. Li firme decidis elhaki novan vojon sur Gobio.

Iun tagon de aprilo de 1966, serenis la ĉielo kaj brilis la suno. Kiam Li Ĝiki estis zorgeme semanta 62 tritikajn grajnoj sur malgranda bedo kun areo de unu kvadrata futo en la eksperimenta kampo, iu komunumano aliris kaj kun scivolemo demandis lin: "Kion vi faras?" Li Ĝiki respondis entuziasme: "Kulturi novan bonan specion!" Tiu denove demandis: "Kiam oni povos elkreskigi sufiĉe da semoj el unu spiko?" Li diris: "Por persistemulo ne ekzistas malfacila afero en la mondo. Se nur oni havas la spiriton labori tutanime por la



*Li Ĝiki klarigas al komunumanoj la karakterizaĵojn de la nova specio.*

revolucio kaj faras diligentan kulturadon, certe la bona specio ĉien disvastiĝos nur post kelkaj jaroj.” Parolante Li Ĝiki ne ĉesigis sian semadon. Korktuŝite de lia spirito la komunumano eklaboris kune kun li.

Fakte, tiuj 62 tritikaj grajnoj estis nefacile akiritaj. En 1965, dum sarkado malriĉkampanino-komunumanino Ĉen Juhua trovis eksterordinaran tritikan spikon kaj tion sciigis al Li Ĝiki. Post ripetada komparo Li Ĝiki rimarkis ĝiajn eksterordinarajn trajtojn. De tiam ĉiutage li iris por atente observi tiun spikon. En aŭtuno li rikoltis 62 grajnoj el ĝi kaj ilin aparte konservis. Tiam Li Ĝiki pensis: kiel fari per homa kulturado la tritikajn semojn formitajn el natura hibrido en bonan specion taŭgan al lokaj cirkonstancoj kaj poste ĝin disvastigi por alta produkto kaj per tio fari pli grandan kontribuon por la revolucio.

Post semado de tiuj 62 grajnoj Li Ĝiki atente observis ilian ĝermadon, branĉiĝon, elspikiĝon kaj ekfloradon..., serioze komparis ilin kun aliaj specioj kaj notis ĉiujn fenomenojn rimarkitajn. Jaron post jaro el tiuj 62 grajnoj jam elkulturiĝis 23 ĝinoj da tiaj semoj. Dank’ al trijara observado,

eksperimentado kaj kulturado, tiu nova tritika specio posedas karakterojn de eltenemo kontraŭ frosto, nefalemo kaj rezistivo kontraŭ malsanoj kaj insektoj, ĝia spiko estas granda kaj ĝiaj grajnoj estas dikaj kaj ne defalemaj. Ĝia pomua produktokvanto atingis pli ol 800 ĝinojn. Krome ĝia heredeco estas stabila kaj ĝi estas plej konforma al la lokaj naturaj kondiĉoj. Li Ĝiki kaj komunumanoj ĝoje nomis tiun tritikan specion “Jumen n-ro 1”.

En malpli ol 5 jaroj post kulturado de la specio “Jumen n-ro 1”, ĝi jam enradikiĝis en Jumen kaj multaj najbaraj lokoj.

Dum la lastaj jaroj ĉie disvastiĝis la laŭdinda faro de Li Ĝiki, kiu gvidis amasojn terkulturi laŭ scienca maniero por akiri altan produkton de greno kaj oleplantoj. Senĉese venis al la kvara produkta grupo homoj por lerni, esplori kaj interŝanĝi bon-speciajn semojn, kaj multaj petis sperton de ĝi per leteroj. Antaŭ la atingoj, honoro kaj aplaŭdo, Li Ĝiki firme memoras la grandan instruon de Prezidanto Maŭ **“modesteco igas nin progresi kaj fiereco igas nin postresti”**, ĉiam tenas en sia koro la tutan landon kaj tutkore klopodas por fari ankoraŭ pli grandan kontribuon al la revolucio.



# Nova Aspekto de Tibeto

**L**A Granda Proletara Kultura Revolucio alportis profundan revolucionan ŝanĝon al la Tibeta Altebenejo. De diversaj lokoj de la suda parto ĝis la stepoj de la nordo ĉie videblas admirinda sceno, ke la vastaj amasoj de la liberigitaj servutuloj vive studas kaj vive aplikas Maŭzedongpenson. Sub la nutrado de Maŭzedongpenso multe da kadroj de tibeta nacieco kaj de aliaj naciminoritatoj rapide kreskis kaj fariĝis fidindaj administrantoj de la ruĝa reĝimo de diversaj niveloj. La vastan altebenejon regas prospereco.

Antaŭ la Liberiĝo, la laboranta popolo de Tibeto troviĝis sub la regado de la plej malluma kaj plej reakcia feŭda servuta sistemo. La tri servutulposedantoj (la feŭda registaro, temploj kaj aristokratio) kaj iliaj agentoj, kiuj kune okupis malpli ol 5 procentojn de la tibeta loĝantaro, posedis la tutan teron, montojn, arbarojn kaj absolutan plejparton de brutoj, ĝuis ĉiujn privilegiojn kaj kruele subpremis la servutulojn kaj sklavojn, kiuj okupis pli ol 95 procentojn de la tibeta loĝantaro.

Post la Liberiĝo, sub la kora zorgo de la Partio kaj Prezidanto Maŭ la miliona liberigita servutularo kunage kun la Popola Liberiga Armeo ĝisfunde likvidis la kontraŭrevolucionan ribelon de la naciperfida Dalai-kliko en 1959, venke realigis la demokratian reformon kaj komplete frakasis la miljaran katenon. La Granda Proletara Kultura Revolucio plie forlavis la malpuraĵojn postlasitajn de la feŭda servuta sistemo kaj forĝis la milionan liberigitan servutularon.

Nun, en la 70 gubernioj de Tibeto jam stariĝis senescepte revolucia komitato kun triflanka kombiniĝo. En ĉiuj niveloj de regpotencaj aparatoj de vilaĝo, distrikto, gubernio, subregiono kaj aŭtonoma regiono, laboras grandaj nombroj da tibetaj kadroj. Ses reprezentantoj de kadroj kaj amasoj de tibeta nacieco estas elektitaj kiel vicestroj de la Revolucia Komitato de la Tibeta Aŭtonoma Regiono. Jang Zong, liberigita servutulino el

la gubernio Ĝjaca, glorie partoprenis la Naŭan Tutlandan Kongreson de la Komunista Partio de Ĉinio kaj estis elektita kiel kandidata membro de la Centra Komitato de la Partio. Eĉ la tre malmultanombra menba-a nacieco havas sian reprezentanton en la revolucia komitato de la aŭtonoma regiono. Comu, juna menba-a distrikta estrino, nun estas elektita kiel vicestro de la revolucia komitato de la subregiono Ŝannan. Tiuj kadroj fariĝis antaŭirantoj, kiuj gvidas la liberigitajn servutulojn iri la socialisman vojon. La kadroj de la tibeta nacieco, han-a nacieco kaj aliaj naciminoritatoj kompakte unuiĝas kaj gvidas la vastajn amasojn de malriĉaj kamparanoj kaj paŝtistoj konstrui novan socialisman Tibeton strikte sekvante Prezidanton Maŭ.

La liberigitaj servutuloj havas senliman amon kaj fidelecon al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. En la granda kultura revolucio, ili vive studas kaj vive aplikas la grandan Maŭzedongpenson kaj forte kritikas la kontraŭrevolucionan reviziisman linion antaŭenpuŝitan de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en Tibeto, tiel ke Maŭzedongpenso estas senprecedence popularigita. Inter la vastaj amasoj de malriĉaj kamparanoj kaj paŝtistoj, aperis grandaj nombroj da aktivuloj de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso.

En la pasintjara vintro kaj ĉijara printempo, Dongga-distrikto de la gubernio Djuelongdeĉen okazigis entute pli ol 60 kursojn de Maŭzedongpenso kun partopreno de pli ol 8,000 homfojoj. En la montvilaĝo Garbang ĉe landlimo loĝas nur pli ol 300 personoj, sed tie aperis unu post alia 52 aktivuloj de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso, inter kiuj troviĝas kadroj, maljunaj kamparanoj, virinoj kaj infanoj. En tiu vilaĝo troviĝas 12 maljunuloj kiuj, kvankam perdis laborkapablon, tamen havis senliman amon al Maŭzedongpenso, meminciate organizis sin por varme propagandi Maŭzedongpenson en la ĉirkaŭaj vila-



ĝoj per rakonto de siaj propraj travivaĵoj en la nova kaj malnova socioj.

Sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio, la armeo kaj popolo en Tibeto disvolvas la revolucionan spiriton sinapogi sur propraj fortoj kaj peneme lukti en malfaciloj kaj renovigis la fizionomion de la vasta altebenejo. En Tibeto kiu eĉ ŝraŭbon ne povis fabriki en la pasinteco, nun jam stariĝis centoj da mezaj kaj malgrandaj fabrikoj, kaj aperis industrioj de hidroelekto, karbo, mekaniko, konstruaj materialoj k. a. Kun vigla disvolviĝo de la industria konstruado, la unua generacio de laboristoj de la tibeta nacieco jam kreskis ĝis la nombro de dekoj da miloj. Inter ili multaj estis akceptitaj en la Komunistan Partion de Ĉinio aŭ elektitaj en revolucionajn komitatojn de diversaj niveloj. Ili plene ludas la rolon de kerno en la revolucio kaj produkto.

Dank' al la stariĝo de popolaj komunumoj en la Tibeta Altebenejo, rapide disvolviĝas la agrikulturo kaj brutbredado. Multaj komunumoj, kiuj antaŭe havis ununuran mastrumadon, iom post iom efektivigis samtempan entreprenon de agrikulturo, forstado, brutbredado, flanka produkto kaj fiŝkaptado. Ili okupiĝas pri transportado, kolekto de kuracherboj, fiŝkaptado kaj ĉasado, kaj metia produkto. En Najdong-gubernio pli ol dek komunumoj kulturis pomoĝardenojn. En 27 komunumoj de Bo-

me-gubernio oni energie plivastigis plantadon de vintra tritiko kaj akiris grandmezuran pliprodukton de greno. Krome, iuj komunumoj entreprenas ankaŭ industrion.

Antaŭ la fondo de la popola komunumo Guangming en antaŭurbo de Lhasa, la tieaj kamparanoj ĉiujare konsumis 170,000 ĝinojn da greno provizita de la ŝtato, sed nur du jarojn post la fondo de la komunumo ne plu estas bezonata la provizado de greno, sed male pli ol 70,000 ĝinoj da superflua greno povas esti vendataj ĉiujare al la ŝtato. La menba-oj, kiuj akiris malaltan produktokvanton uzante lignobastonojn kiel plugilojn en terkulturo antaŭ la Liberiĝo, nun jam uzas plugilojn de nova tipo kaj aliajn agrikulturilojn kaj tiel multe levis sian produktokvanton. Ili konstruis elektrostacion, kaj la elektraĵ lampoj lumigas la menba-ajn montvilaĝojn. La menba-a popolo diris emocie: "Estas la brilo de Maŭzedongpenso, kiu lumigas la koron de la menba-a popolo!"

Kun disvolviĝo de la industrio, agrikulturo kaj brutbredado multe pliboniĝis la materia kaj kultura vivo de la vastaj amasoj de kamparanoj kaj paŝtistoj. En la vastaj paŝtejoj, paŝtistoj, kiuj de ĉiam loĝis en ĉifonaj tendoj antaŭ la Liberiĝo, nun konstruis por si novajn domojn. En la Popola Komunumo "Hongki" de Nagĉu-gubernio, kiu havas 146 familiojn, dum la lastaj tri jaroj estis nove konstruitaj



*Giacuo (la dua de maldekstre), tibeta laboristo de la Nagin-a Elektrejo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono kaj membro de la elektreja revolucia komitato, ofte profundiĝas inter la laboristajn amasojn kaj faras zorgan penetrivan ideologi-politikan laboron, tiel ke la elektrejo senĉese akiras novajn atingojn kaj en revolucio kaj en produkto.*

124 ĉambroj. En Tibeto, antaŭ la Liberiĝo ne troviĝis eĉ unu lernejo servanta al la laboranta popolo, sed nun en ĉiu vilaĝo estas lernejo. En la Popola Komunumo "Hongki" ĉiu brigado havas elementan lernejon. Multaj vilaĝoj kulturis por si "nudpiedajn kuracistojn". Vidinte la ĉiam pli grandan ŝanĝiĝon de Tibeto, la vastaj amasoj de malriĉaj kamparanoj kaj paŝtistoj plenaj de heroa sento decidis por ĉiam brave marŝi antaŭen laŭ la direkto montrita de Prezidanto Maŭ.



*Servutuldevena Cijenlamu, vicestro de la revolucia komitato de la aŭtonoma regiono, profundigis inter amasojn. Jen ŝi petas opiniojn de komunumanoj eĉe kamprando.*



### LONGVIVAJ LAMPOPIROJ

La Kantona Lampopira Fabriko sukcesis fabrikigi longvivan lampopiron, kiu povas funkcii 5,000 horojn, t. e. kvaroble pli longe ol la ordinaraj lampopiroj, sed ĝia produktokosto estas sama kun tiu de la ordinaraj. Nun oni jam komencis ĝin produkti pogrande.

Delonge la lampopiroj uzataj en nia lando estas fabrikitaj laŭ fremdlanda teknologia

literaturo de la tridekaj jaroj. Tia lampopiro povas funkcii maksimume 1,000 horojn. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la vastaj amasoj de laboristoj de tiu fabriko firme decidis rompi tiun "internacian normon" kaj prove fabrikigi longvivajn lampopirojn. Ili organizis grupon de triflanka kombiniĝo el laboristoj, revoluciaj kadroj kaj teknikistoj, tuj komencis provfaradon kaj rapide sukcese fabrikis la unuan nombron da longvivaj lampopiroj. Por solvi la kontraŭdiron inter longviveco kaj heleco de lampopiro, ili kontinue faris eksperimentojn, plibonigis la teknologion de drataranĝo kaj vakuigon, kaj finfine produktis lampopirojn de diversaj povoj, kiuj ne konsumas pli multe da elektro, sed estas longvivaj kaj lumaj.



# Altigu la Singardemon kaj Defendu la Patrolandon

*Firme tenante en sia koro la grandan instruon de Prezidanto Maŭ "altigu la singardemon kaj defendu la patrolandon", batalantoj de ĈPLA kiuj gardas insulon sur la fronto de la Flava Maro kaj milicianoj tage kaj nokte patrolas sur la mardefenda fronto.*



*Diversnaciecaj armeanoj kaj popoloj gardantaj la landlimon en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio de nia lando centoble akriĝas la singardemon kaj ĉiam estas pretaj por ekstermi malamikojn kiuj aŭdacas entrudiĝi.*








*La komandantoj kaj batalantoj de la "Mara Avangarda Militboato" elektita kiel militboato kun kvar bonoj en naŭ sinsekvaj jaroj korverŝe interparolas pri komprenaĵoj en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ.*

*Milicianoj de la Liŭguang-a Milica Bataliono de Henan-provinco havanta gloran revolucionan tradicion aŭskultas rakonton de Ŝi Lajhe, sekretario de la brigada partia filio, pri la glora tradicio de la bataliono.*





Por daŭrigi kaj disvolvi la gloran revolucionan tradicion de la Ruĝa Armeo, komandantoj kaj batalantoj de iu parto de Kunming-a Trupo venis al bordo de Vugiang-rivero piedirinte mil liojn laŭ la vojo irita de la Ruĝa Armeo dum la Longa Marŝo. Jen maljuna malriĉkamparano Li Ŝuvu, kiu remis tiutempe por la Ruĝa Armeo, rakontas al ili, kiel la heroaj batalantoj de la Ruĝa Armeo transpasis la naturan obstaklon de Vugiang-rivero spite al malfaciloj kaj al morto.



Membro de agrikulturo-subtenanta grupo de iu fervoja trupo de ĈPLA kune kun komunumanoj de Jinacieco studas Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong.



# Rapide Disvolviĝis la Maŝinfabrika,

## Kemisterka kaj Elektropova

### Industrioj de Nia Lando

**S**UB la direkto de la ĝenerala linio elmetita de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ "streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie", la laborista klaso de nia lando, persistante en komando de produkto per revolucio, efike kaj profunde disvolvante amasan revolucian kritikon, rapide levis senprecedence vastan kaj profundan novan altan tajdon en industria produkto kaj akiris brilajn sukcesojn en la maŝinfabrika, kemisterka kaj elektropova industrioj.

#### MAŜINFABRIKA INDUSTRIO

Enpaŝinte la grandan periodon de la sepdekaj jaroj, la produkta nivelo de nia maŝinfabrika industrio altiĝas kun ĉiu monato. La produkta nivelo de ekipaĵoj bezonataj por disvolvo de ferŝtala industrio, traktoroj kaj dizeloj bezonataj de agrokultura produkto, ekipaĵoj por petrol-industrio, kemi-industrio kaj elektroproduktado, metaltranĉaj ilmaŝinoj, ekipaĵoj por forĝado kaj premo, aŭtoj, lagroj, blovmaŝinoj, transformatoroj kaj aliaj maŝinoj kaj elektrokipaĵoj multe superis tiun de la sama periodo de la pasinta jaro. La sukceso de granda nombro da teknikaj renovigoj levis nian produktan teknon en maŝinfabrika industrio al nova nivelo.

Frue en la jaro 1958, sub la brilo de la ĝenerala linio por socialisma konstruado persone ellaborita de Prezidanto Maŭ, pli ol mil mezgrandaj kaj malgrandaj maŝinfabrikoj jam estis starigitaj en diversaj lokoj de nia lando. La Granda Proletara Kultura Revolucio forte stimulis la aktivecon kaj kreivon de la vastaj amasoj kaj arda tajdo de starigo de loka maŝinfabrika industrio per la propraj fortoj vigle leviĝas tra la tuta lando. En la provincoj kaj autonomaj regionoj Henan, Gianghi, Hejlonggiang, Giangsu, Ŝandong, Junnan, Guanghi, Kinghaj k. a.

ĉie stariĝis kaj rapide disvolviĝas mezgrandaj kaj malgrandaj maŝinfabrikoj kaj fabrikoj kaj riparejoj de agrokulturaj maŝinoj. En la pasinteco, Henan-provinco ne povis produkti kompletajn ekipaĵojn bezonatajn de ĝia loka industrio, sed nun ĝi jam povas produkti kompletajn ekipaĵojn por malgranda fer-produkta fabriko kun jara produktokapablo de cent mil tunoj da gisfero, por malgranda karboŝakto kun jara produktokapablo de cent kvindek mil tunoj, malgranda hidroelektrejo kun kapacito de kvindek kilovatoj, malgranda cementfabriko kun jara produktokapablo de dek mil tunoj kaj malgranda kemisterka fabriko kun jara produktokapablo de kvar mil tunoj kaj tiamaniere kreis favorajn kondiĉojn por akceli la disvolvon de loka industrio.

Samtempe kun la disvolviĝo de la mezgrandaj kaj malgrandaj lokaj maŝinfabrikoj, multaj grandaj maŝinfabrikoj ludis rolon de spino. En la pasinta jaro, la produktokvanto de ilmaŝinoj de la Unua Ilmaŝina Fabriko de Pekino kreis novan rekordon en sia historio. Kaj la produktokvanto en la unuaj kvar monatoj de la kuranta jaro preskaŭ unuoble pliiĝis ol tiu de la sama periodo de la pasinta jaro. La traktora fabriko Dongfanghong de Luojang energie disvolvis amasan movadon de teknika renovigo, dank' al kio ĝi superplenumis ĉiumonate la produktoplanon antaŭdate en la kuranta jaro, senĉese altiĝis la kvaliton de la produktaĵoj kaj faris novan kontribuon en subteno al agrokulturo.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la malnovaj maŝinfabrikaj bazoj kiaj Pekino, Ŝanhajo, Tiangin kaj Liaŭning ludis pli viglan rolon kaj provizis modernajn maŝinojn kaj ekipaĵojn por multaj ĉefaj konstruaj objektoj de la ŝtato. En Ŝanhajo la produktokapablo kaj kompleteco de la produktitaj ekipaĵoj rapide altiĝis, dank' al praktiko de kombiniĝo de grandaj, mezgrandaj kaj malgrandaj en-



treprenoj, kombiniĝo de fabrikoj de ĉefmaŝinoj, fabriko de akcesoraĵoj kaj fabriko en kunlaboro pri teknologio, kombiniĝo de indiĝenaj kaj modernaj metodoj kaj vasta disvolvo de socialisma kunlaboro.

En la pasinta pli ol unu jaro, la vastaj amasoj de niaj kuraĝaj, diligentaj kaj saĝaj maŝinfabrikaj laboristoj akiris multajn novajn atingojn. Ekzemple, laboristoj mem sukcese projektis kaj produktis 125,000-kilovatan generatoran kompletan kun interne farita duobla akva malvarmigo, 120-tunan Bessemer-fornon de LD-procedo, novtipan elektronan ilmaŝinon, 4,000-tunan horizontalan premmuldan maŝinon, 32-tunan kaj 40-tunan kamionojn memmalŝarĝajn, grandkapacitan gasturbinon, du-finan tubokurbigilon, riztransplantan maŝinon kaj aliajn, entute pli ol mil novajn specojn de ekipaĵoj, el kiuj multaj karakteriziĝas per malpezeco, malgrandeco, alta efiko, simpla strukturo kaj facileco en manipulado. Iuj el tiuj produktaĵoj jam atingis aŭ superis la avangardan nivelon de la mondo.

### KEMISTERKO

En la potenca favora vento de la Granda Proletara Kultura Revolucio, la vastaj laboristaj amasoj sur la fronto de kemisterka industrio de nia lando nove konstruis aŭ pligrandigis en la lastaj jaroj grandan nombro da grandaj, mezgrandaj kaj mal-


grandaj kemisterkaj fabrikoj laŭ la principo de multeco, rapideco, bonkvaliteco kaj ekonomieco kaj nun faras novajn kontribuojn en subteno al agrokulturo por batalakiri riĉajn rikoltojn.

Nun, malgrandaj kemisterkaj fabrikoj disfloras tra la tuta lando. Dek gubernioj en antaŭurbo de Ŝanhajo ĉiuj havas sian malgrandan kemisterkan fabrikan. Du trionoj de la gubernioj de Giangsu-provinco jam havas malgrandan fabrikan de nitrogena sterko kaj duono de la gubernioj jam havas malgrandan fabrikan de fosfora sterko. Ankaŭ en la provincoj Ŝandong, Gianghi, Anhuj, Henan k. a. malgrandaj kemisterkaj fabrikoj en la lastaj jaroj ricevis pli grandan disvolviĝon kaj ludis ĉiam pli gravan rolon en akcelo de la agrokultura pliprodukto.

Antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio, nur malmultaj provincoj de nia lando povis fabriki kompletajn ekipaĵojn por malgrandaj fabrikoj de nitrogena sterko, sed nun jam multaj provincoj povas tion fari pogrande. Hodiaŭ, la produktokvanto de la malgrandaj fabrikoj de nitrogena sterko jam kreskis de 12 procentoj en 1965 ĝis 43 procentoj en la totala produktokvanto de la tuta lando.

Por pli bone efektiviĝi la grandan strategian principon de Prezidanto Maŭ "sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion

*Laboristoj de la Unua Ilmaŝina Fabriko de Ŝenjang muntas novajn multspindelajn tornilojn.*




por la popolo” per produkto de pli multe da kemia sterko por subteni agrokulturon, kemisterkaj fabrikoj de Fugian, Gianghi, Guanghi k. a. lokoj vaste mobilizis la amasojn, faris teknikan renovigon, rompis la katenon de la rutino, ke necesas preni koakson kaj bonkvalitajn antracitajn pecojn kiel materialojn por produkti sintezan amoniakon, sukcesis produkti sintezan amoniakon per malbonkvalita karbo kaj karbopulvoro kaj akiris bonan sperton en plivasta disvolvo de la produkto de kemia sterko.

## ELEKTROPOVO

La produktokvanto de elektro de nia lando en la unua sezono de la kuranta jaro multe superis la rekordon de la sama periodo en la historio; rimarkinde reduktiĝis la karbokonsuma kvanto por produkto de ĉiu kilovathoro da elektro kaj grandpaŝa progreso daŭris en tio en aprilo kaj majo. Multe grandiĝis la rapideco de la fundamenta konstruado de nia elektropova industrio. Samtempe kun energia konduko de la konstruado de grandaj elektrejoj kaj gravaj transmisiaj linioj de elektro, aperis ĉie de la sudo ĝis la nordo de nia lando arda tajdo de amasa entrepreno de mezgrandaj kaj malgrandaj hidroelektrejoj per la propraj fortoj.

En sia praktiko de batalado, la vastaj revoluciaj amasoj de nia elektro-industria fronto profunde komprenis, ke la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado povas vigle disvolviĝi, se nur oni centpocente efektivas la proletaran revolucion linion de Prezidanto Maŭ. Antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio, Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj plene energie distrumpetis la absurdan aserton pri “eksterordinareco de elektro-industrio” en la elektropova produkto, serioze subpremis la revolucion aktivecon kaj kreivon de la vastaj laboristaj amasoj kaj katenis la rapidan disvolviĝon de nia elektro-industrio. La rigora malpermeso de elektroprodukto je supernominala kapacito en la pasinteco estas plej tipa ekzemplo. Laŭ fremdlanda regularo, la ĉefaj ekipaĵoj kiaj kaldronego, vaporturbino kaj generatoro, nepre devas funkcii ne super la maksimuma kapacito difinita de la origina projekto, kaj funkciado je supernominala kapacito estis absolute malpermesita. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la laboristaj amasoj, revoluciaj kadroj kaj teknikistoj de la Ŝigiaĝuang-a Termoelektrejo de Hebej-provinco rompis la fremdlandan regularon, alprenis fidindan sekurigan teknikan aranĝon post ripetada eksperimentado kaj interkonsiliĝo kaj sukcesis en produkto de elektro multe super la maksimuma kapacito, tiel ke la produkta kapacito de multaj generatoraj kompletoj




*Ĝeng Dajju (la dekstra), inĝeniero de la Anŝan-a Elektro-administrejo kune kun laboristo sukcese faris laboron sur linio de 220,000-volta tensio sen interrompo de kurento.*

altiĝis je pli ol 50 procentoj. Nun centoj da elektrejoj en la tuta lando jam lernis kaj aplikis la sperton de la Ŝigiaĝuang-a Termoelektrejo, tiel ke multaj malnovaj ekipaĵoj produktas pli multe da lumo kaj varmo, farante novajn kontribuojn al la socialisma konstruado.


En la arda tajdo de amasa starigo de mezgrandaj kaj malgrandaj hidroelektrejoj per la propraj fortoj, la nombro de la mezgrandaj kaj malgrandaj hidroelektrejoj ekkonstruitaj en la lastaj vintro kaj printempo en Gianghi-provinco estas duoblo de tiu de la periodo de post la Liberiĝo. En Guangdong-provinco, pli ol 3,000 malgrandaj hidroelektrejoj estas en konstruado. La rapida disvolviĝo de la konstruado de mezgrandaj kaj malgrandaj hidroelektrejoj multe akcelas la antaŭenmarŝon de la elektroindustrio de nia lando.



*Sinapogante sur propraj fortoj, Fej-  
hiang-gubernio de Hebej-provinco star-  
igis malgrandan fabrikon de sinteza  
amoniako.*



*La Gianghi-a Generatora Fabriko suk-  
cese provfaris novan sinkronan motoron.*



# Nova Vojo Elhakita en Nia

## Ŝipkonstrua Industrio

ŜIPKONSTRUA industrio havas longan historion en nia lando. Antaŭ pli ol 3,000 jaroj niaj prapatroj jam inventis boaton. Nia moderna ŝipkonstrua industrio komenciĝis antaŭ pli ol cent jaroj. Sed, antaŭ la Liberiĝo, sub la kruela regado de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo, ĝi havis malfortan bazon kaj disvolviĝis malrapide, troviĝante en postrestinta stato, povante nur ripari, sed ne konstrui.

Post la fondo de la Ĉina Popola Respubliko, sub la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ kaj CK de la Partio, la ŝipkonstrua industrio ricevis novan vivon kaj multe disvolviĝis. En produkta kapablo ĝi disvolviĝis de riparo de malgrandaj ŝipoj al memprojektado kaj memkonstruado de ŝipoj de granda tipo, kaj en rilato de materialoj kaj ekipaĵoj de dependo de importo el fremdaj landoj al kompleta memprovizo. Sur la bazo de nenio, sciencaj esploraĵoj de ŝipkonstruo komenciĝis kaj disvolviĝas de malgrando al granda, de esploro kaj projektado de ordinaraĵoj al tiuj de produktaĵoj kun monda progresinta nivelo. En 20 jaroj nia ŝipkonstrua industrio trairis la vojon, por kiun trairi kapitalismaj landoj bezonis pliparton de jarcento, kaj skribis brilan paĝon en nia ŝipkonstrua historio.

De 20 jaroj nia ŝipkonstrua industrio disvolviĝas sub la direktado de la granda orientilo de Prezidanto Maŭ **“sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj”**. La vastaj amasoj de niaj ŝipkonstruaj laboristoj decidis vaste disvolvi ŝipkonstruan industrion sur la malforta bazo por akceli nian navigacian kaj akvoproduktan aferon, solidigi nian maran defendon kaj subteni la mondan revolucion. Sed la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en tiu industria branĉo senbride predikis kompradoran filozofion adorantan fremdlandojn kaj antaŭenpuŝis

kontraŭrevolucion reviziisman linion en tiu kampo. Pretekstante la postrestintecon de la produktaj fortoj de la ŝipkonstrua industrio kaj ties malfortan bazon, ili kriaĉis: “Estas prefere aĉeti ŝipojn ol ilin konstrui kaj estas prefere lui ŝipojn ol ilin aĉeti”, oponante la vojon de disvolvo de propra ŝipkonstrua industrio. Sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la ŝipkonstruaj laboristoj de nia lando faris decideman batalon kontraŭ la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Liu Ŝaŭki. Sub malfacilaj kondiĉoj, sinapogante sur la ĉiamvenka Maŭzedongpenso kaj siaj propraj manoj kaj saĝo, ili sukcesis konstrui 10,000-tonelajn oceajn varŝipojn, 15,000-tonelan olean ŝipon, 10,000-ĉevalpovan dizelon kun malalta rapideco por ŝipoj kaj precizajn instrumentojn uzatajn por pilotado. Iuj produktaĵoj multe superis la progresintan nivelon de la mondo. En la pasinta jaro niaj laboristoj konstruis nian unuan glacirompan ŝipon de granda tipo per alta rapideco de 134 tagoj, sinapogante sur propraj fortoj. La ŝipkonstrua industrio ampleksas multajn industribranĉojn kaj bezonas tre multajn kaj diversajn objektojn. Por memstare disvolvi la ŝipkonstruan industrion de la patrio, la laboristoj apogas sin sur landskala kunlaboro kaj rapide kompletigis la industrian sistemon de ŝipkonstruado.

Nia ŝipkonstrua industrio persistas en la orientilo de penema lukto en malfaciloj, utiligo de utiligeblaj ekipaĵoj, samtempa apliko de lokaj kaj modernaj procedoj kaj kunlaboro de grandaj, mezaj kaj malgrandaj fabrikoj. Dank’ al tio estas plene disvolvita la aktiveco kaj kreivo de la amasoj. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ **“Nur post detruo de malnovaj, putraj, estas eble starigi novajn, sanajn”**, la vastaj amasoj de ŝipkonstruaj laboristoj faris fortajn atakojn kontraŭ la dekstrema konservativa penso kaj la distrustetado de la teknika mistereco kaj adorado al fremdlandoj. Disvolvante la revolucion spiriton kuraĝi pensi kaj agi, ili



konstruis 10,000-tonelajn ŝipojn sur litoj por ŝipoj 3,000-tonelaj kaj 5,000-tonelaj.

En iu ŝipkonstruejo estis burĝara teknika “aŭtoritatulo”, kiu studis iam en Usono. Li tutajn tagojn dronis en eksperimentoj pri elektroskoria veldo, sidante en laboratorio. Sed malŝparinte multe da monrimedoj, li atingis nenian rezulton. Sed, la laboristoj, kiuj liberigis sian penson kaj rompis superstiĉon, en mallonga tempo, post dekoj da provadoj ekposedis la novan teknikon, kion la burĝara teknika “aŭtoritatulo” ne sukcesis dum dek jaroj.

Iu navigacia ekipaĵo havas tre komplikan strukturon. Antaŭe, ĝi estis nur kopie fabrikita, sed ne estis permesite ĝin reformi. La laboristoj serioze esploris ĝin dum praktikado kaj fine ĝin komplete reformis.

Ekde la nuna jaro, sub la stimulo de la revolucio, aperis bonega situacio de konkurso en la ŝipkonstrua industrio en Ŝanhajo, Tiangin k.a. lokoj. La vastaj amasoj de ŝipkonstruaj laboristoj faris decidon konstrui diversajn ŝipojn bezonatajn de la ŝtato pli multe, rapide, bone kaj ekonomie. Venkinte multajn malfacilojn, la laboristoj de la Giangnan-a Ŝipkonstrua Fabriko en Ŝanhajo finkonstruis la 10,000-tonelan oceanan varŝipon “Yue Yang” per mirinda rapideco de 31 tagoj, kreante la rekordon de periodo de uzo de ŝiplito por 10,000-tonelaj ŝipoj en nia lando. Ankaŭ la Ŝanhaja Ŝipkonstrua Fabriko, Hudong-a Ŝipkonstrua Fabriko kaj aliaj multe plifruigis la daton de surakviĝo kaj provnavigado de la grandaj ŝipoj, kiujn ili konstruis.

Nun, disvolvante la spiriton de daŭra revolucio la vasta ŝipkonstrua laboristaro de nia lando klopodas energie por rapide disvolvi la ŝipkonstruan industrion de nia lando.

*Laboristoj de la Tiangin-a Ŝipkonstruejo forte kritikas la “rampismon” kaj “kompradoran filozofion” dissematajn kaj antaŭenpuŝitajn de Liu Saŭki.*



# Rapidega Konstruado de Dekmil-tonelaj Ŝipoj

**E**N la 25-a de junio, samtempe sukcese surakviĝis antaŭ la fiksita dato la dekmil-tonela oceana varŝipo Yue Yang kaj la dekmil-tonela dragŝipo Xian Feng de skrapa kaj suĉa tipo, projektitaj de nia lando mem, kiujn konstruis laboristoj, kadroj kaj teknikistoj de Giangnan-a Ŝipkonstrua Fabriko de Ŝanhajo kun alta rapideco kaj alta kvalito, sub la direktado de la granda principo de Prezidanto Maŭ “**sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj**”, streĉante plene la energion kaj strebante forte antaŭen, kaj la periodo de surŝiplita konstruado de Yue Yang estis nur 31 tagoj, kio skribis novan ĉapitron en la ŝipkonstrua historio de nia lando.

## NOVA FIZIONOMIO DE CENTJARA FABRIKO

Giangnan-a Ŝipkonstrua Fabriko kun aĝo de 105 jaroj estas lulilo de la unua generacio de la ŝanhaja laboristaro. En la malnova socio, ĝi estis nur ejo uzata de imperiistoj, feŭda regantaro kaj la kuomintanga reaktularo por ekspluati laborantajn popolanojn kaj akiri malkarajn laborfortojn. En la pli ol 80 jaroj antaŭ la Liberiĝo, ĝi estis nur fabrikaĉo, kiu povis nur fari riparadon aŭ konstrui “anasido-ŝipetojn”, kies ĉiuj partoj, eĉ inkluzive de malgrandaj boltoj kaj nitoj, devis esti importitaj. En longaj jaroj la laboristoj de Giangnan-a Ŝipkonstrua Fabriko penlaboradis grasigante la imperiistojn kaj kuomintangajn reaktulojn per sia sango

kaj ŝvito, sed ili mem havis nenion kaj vivis en malsato kaj frosto.

En la jaro 1949, liberiĝis Ŝanhajo. Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio gvidis la ĉinan popolon renversi la malluman regadon de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo, Giangnan-a Ŝipkonstrua Fabriko revenis en la manojn de la popolo kaj la vastaj amasoj de ŝipkonstruaj laboristoj fariĝis mastroj. En la starigo de nova sendependa sistemo de ŝipkonstrua industrio de nia lando, la laboristoj de la fabriko konstruis per siaj manoj diversajn ŝipojn kun monda avangarda nivelo, kia la dekmil-tonela oceana varŝipo Dong Feng. Kaj precipe en la Granda Proletara Kultura Revolucio, la ŝipkonstruaj laboristoj forte kritikis la kompradoran filozofion de la renegato Liu Ŝaŭki, kia “**prefere aĉeti ŝipojn ol ilin konstrui kaj prefere lui ŝipojn ol ilin aĉeti**”, kaj lian rampismon kaj surakvigis unun post alia kvar dekmil-tonelajn ŝipojn projektitajn de nia lando mem, tiel ke la centjara fabriko montris freŝan forton de juneco kaj ĝia fizionomio noviĝas kun ĉiu tago.

## KONSTRUADO DE DEKMIL-TONELAJ ŜIPOJ JE ALTA RAPIDECO

La 10-an de januaro, 1956, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ venis al Giangnan-a Ŝipkonstrua Fabriko. Tiu tago estis feliĉa tago neforgesebla por la ŝipkonstruaj laboristoj dum la tuta vivo.





*Respondeculo de la ŝipkonstrueja revolucia komitato (la meza) diskutas kun laboristoj pri laboro sur ŝiplito.*

La kora prizorgo de Prezidanto Maŭ tre forte kuraĝigis la vastajn amasojn de ŝipkonstruaj laboristoj; simile al brila lumturo, la instruaj vortoj de Prezidanto Maŭ lumigis ilian koron. Kaj en tiu jaro, la totala produkta valoro de tiu ŝipkonstruejo kreskis je pli ol 80 procentoj kompare kun tiu de la antaŭa jaro. Sub la brilo de la ĝenerala linio persone ellaborita de Prezidanto Maŭ **“streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie”**, ili konstruis la unuan dekmil-tonelan oceanan varŝipon de nia lando.

En majo de la kuranta jaro, Giangnan-a Ŝipkonstrua Fabriko plenis je ankoraŭ pli granda entuziasmo kaj fervoro. La vastaj amasoj de ŝipkonstruaj laboristoj komencis la konstruadon de la hulo de la ŝipo Yue Yang je 18 tagoj antaŭ la fiksita dato, ĝin konstruadis kaj surakvigis samtempe kun la dragŝipo Xian Feng kaj tiamaniere faris novan kontribuon al la disvolvo de nia ŝipkonstrua industrio laŭ la principo **“multe, rapide, bone kaj ekonomie”**.

Dank' al la ĉiamvenka Maŭzedongpenso, la ŝipkonstruaj laboristoj sukcese konstruis la dekmil-tonelajn ŝipojn Yue Yang kaj Xian Feng. Ili peneme luktadis tiel en noktoj kiel en tagoj. Disŝprucantaj brilaj fajreroj kaj blindiga lumo de elektra veldado jen kaj jen vidigis la figurojn de ŝipkonstruistoj, kiuj ŝvitegante bataladis, kaj la arganoj estis ŝvingantaj siajn gigantajn brakojn. Tio formis impone belan bildon.


Post kiam komenciĝis la konstruado de la ŝipo Yue Yang, pluvegis kaj ventegis en pluraj sinsekvaj tagoj. Pluvakvo fluis en la juntojn de la kunveldendaj pecoj de la ŝipkorpo, kio estigis grandan malfacilon por la veldistoj. Sed la ŝipkonstruistoj havas senfinan saĝon, ili kreis novan teknologion kaj malebligis al pluvakvo flui en la juntojn. La veldistoj kaj glatigistoj kunlaboris unuanime, bone farante la laboron de sekigado, veldado kaj glatigado de velditaj juntoj, tiel ke la kunveldado de la ŝipkorpaj pecoj estis neniom influita de pluvo. En kunigado de la grandaj partoj de la ŝipkorpo, oni okazigis ĉelokan kunvenon de tri-

flanka kombiniĝo kun laboristoj kiel la kerno, armis la cerbon de la laboristoj, kadroj kaj teknikistoj per Maŭzedongpenso, faris sciencajn esploron kaj analizon pri la kunigo de la grandaj partoj de la ŝipkorpo, rompis rutinajn regularojn kaj renovigis malnovajn teknologiojn. Oni unue kunmetis pecojn en pecegojn kiujn oni kunigis poste per argano, tiel ke la laboro iris rapide kaj bonkvalite. Kiam la laboristoj muntis 77-tunan ŝipkorpan parton de Yue Yang, ili kuraĝe turnis la kolosan parton en aero anstataŭ sur tero, disvolvante la spiriton de “**kapto de ĉiu horo**”, tiel ke ili plenumis la laboron en nur iom pli ol unu horo kaj kreis novan rekordon en la historio de levportado de Giangnan-a Ŝipkonstrua Fabriko. En la kunigado de la ŝipkorpaj partoj, ankaŭ la lokado de la poŭpo estis peniga batalo. La poŭpa parto de Yue Yang pezas pli ol 50 tunojn, longas pli ol 8 metrojn, kaj du trionoj de ĝi elstaras ekster la hulo. La centra linio de tiu parto devas esti precize lokita. Se oni farus laŭ la rutina maniero, unue ok homoj devus labori 5 tagojn por fari subtenan framon. Sed la laboristoj kuraĝis iri vojon neniam


iritan de la antaŭuloj kaj lokis la poŭpan parton en aero helpate de arganoj, sen uzo de subtena framo. Kiam oni alfiksis la poŭpan parton, furioze sin ĵetis al la ŝiplito tajda torento de Huangpu-rivero, kiu levis tabulojn de la ŝiplita skafaldo kaj ilin ĵetis al la framo tenanta la centran linian fadenon. Se la fadeno estus movita, tiam vaniĝus ĉio farita. En tiu kriza momento, la streĉe batalantaj ŝipkonstruistoj saltis, sen konsidero pri sia vivsekuro, en la ĝisbruste profundan akvon, firme subtenis la framon per siaj manoj kaj malebligis alpuŝiĝon de la skafaldaj tabuloj. Ili intense batalis dek horojn en furiozaj ondoj kaj sukcese plenumis la taskon de alfikso de la poŭpo.

En projektado de dekmil-tonela dragŝipo, ĝenerale oni aplikas tri specojn de movsistemo, nome avangarda tekniko de variigebla helico kontrolata per statik-hidraŭliko, puŝado per elektropovo kaj puŝado per dizelo. En konstruado de la dekmil-tonela dragŝipo Xian Feng, la ŝipmotoraj laboristoj kun heroa aspiro kuratingi kaj superi mondan avangardan nivelon organizis provfabrikan grupon

*Ŝipkonstruaj laboristoj laboras sur ŝiplito.*







*Laboristoj kreis la metodon "turni en la aero", kaj per tio multe altigis la laborefikon en muntado.*

de triflanka kombiniĝo kun laboristoj kiel la kerno, faris projektadon kaj eksperimentadon samtempe. Post ripetada praktikado kaj plibonigoj ili fine konkeris la plej novan teknikon de la mondo de variigebla helico, sukcese provfabrikis grandtipan variigeblan helicon kaj per tio ŝtopis breĉon en la ŝipkonstrua industrio de nia lando. Nun la dekmil-tonela dragŝipo Xian Feng jam alprenis variigeblan helicon faritan de nia lando, tiel ke ĝi saltis en la avangardan vicon.

### SENLIME POTENCA ESTAS AMASA MOVADO

Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, la revolucia komitato de Giangnan-a Ŝipkonstrua Fabriko senrezerve movis la amasojn, energie kondukis amasan movadon kaj faris ĉion eblan por ke la laboris-


taro plene ludu sian rolon de ĉefforto. La diversnivelaj gvidantaj kadroj de la tuta fabriko iniciative profundigis en la plejfronton de produkto, lernadis kune kun la laboristoj kaj batalis kun ili ŝultro-ĉe-ŝultre. Ili venkis la malfacilojn kaj solvis kontraŭdirojn per Maŭzedongpenso, kaj la malnova kutimo de dependado de "specialistoj" en tekniko kaj administrado kaj multaj malraciaj regularoj kaj sistemoj estis rompitaĵoj de la revolucia torento. Ĉiuj fakoj de la fabriko bonege kunlaboris kiel ŝnuretoj kuntorditaj en ŝnuregon, kaj aktive prenis por si pezajn taskojn kun alta spirito de komunisma interhelpo; plene disvolviĝis la revolucia aktiveco kaj kreemo de la vastaj amasoj de laboristoj kaj oficistoj. En la pasinteco, junaj laboristoj estis malpermesitaj partopreni la kunigadon de la ŝipkorpaj partoj kaj elektro-veldistoj sub la kvina klaso ne estis permesitaj kunvendi la "grandajn partojn", sed nun junaj laboristoj montris grandan kapablon en la kunigo de la ŝipkorpaj partoj. Metilernantinoj de veldado, kiuj apenaŭ pasigis 18 monatojn post sia veno en la fabrikon, eĉ veldis juntojn

de ŝipkorpaj partoj kune kun veteranaj laboristoj. Disvolvante la revolucian spiriton timi nek malfacilojn nek morton, ili penetris en la malsuprajn kajuutojn, tie daŭre batalis naŭ horojn kaj sukcese plenumis sian taskon kaj la kvalito de iliaj veldaĵoj atingis altan nivelon.

La hulo de Yue Yang estis dividita en la du partojn de pruo kaj poŭpo, kies muntadon direktis nek "specialisto" nek "aŭtoritatulo" sed juntglatigisto kaj triaklasa muntisto. Ja estas maloftaĵo, ke ordinara juntglatigisto kaj ordinara muntisto direktas la muntadon de dekmil-tonela ŝipo.


Tenante la patrolandon en sia koro kaj direktante sian rigardon al la tuta mondo, la laboristoj, kadroj kaj teknikistoj de Giangnan-a Ŝipkonstrua Fabriko firme decidis fari novan kontribuon en starigo de ŝiparo por oceana transportado.

# *Giangnan-a Ŝipkonstrua Fabriko en Antaŭenmarŝo*



La 10,000-tonelaj ŝipoj "Juejang" kaj "Hianfeng" estas en konstruado.





## Ŝiplito en nokto

Gvidantoj de la fabriko profundigis en la laboristajn amasojn ĉe la ŝiplito kaj faras korverŝan interparolon kun ili.

Muntado de la ĉefmotora kranko






Modelaj majstro kaj metilernantino laborantaj ĉe la ŝiplito

Plur-direkta tranĉmaŝino projektita kaj fabrikita de laboristoj mem estas kaj malpeza kaj facile manipulebla.



La teknika grupo de triflanka kombinigo interkonsiligas pri renovigo de malnova teknologio.





La 10,000-tonelaj oceana varŝipo "Juejang"  
kaj dragŝipo "Hianfeng" de skrapa kaj  
suĉa tipo venke surakviĝas samtempe.



# **Prezidanto Maŭ Zedong**

## **pri**

# **Popola Milito**

(En Esperanto)

ENHAVO

Revolucioj kaj Revoluciaj Militoj Estas Neeviteblaj en Klasa Socio  
El la Pafilo Venas Ŝtatpotenco

Imperiismo kaj Ĉiuj Reakciuloj Estas Paperaj Tigroj

La Decida Faktoro de Venko kaj Malvenko en Milito Estas Homoj  
sed Ne Objektoj

La Revolucia Milito Estas Milito de la Amasoj

Fondi Bazlokojn en la Kamparo kaj Sieĝi la Urbojn per la Kamparo

La Popola Liberiga Armeo Estas Armita Kolektivo Plenumanta  
Revoluciajn Politikajn Taskojn

La Strategio kaj Taktikoj de Popola Milito

Nia Ĉefa Metodo Estas Lerni Militi en Milito

50 pĝ.

7.3×10.5 cm.

kun ruĝa plasta kovrilo

Eldonita de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio

Distribuas la Libro servo de la Ĉina Esperanto-Ligo,

P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio



# Maĉala-a Karbominejo

**L**A konstruado de Maĉala-a Karbominejo komenciĝis de la fino de 1966. Kiam hanaj kaj tibetaj laboristoj ĵus venis al Maĉala, ili renkontis altajn montojn kovritajn de glacio kaj neĝo kaj malbonan kaprican klimaton. Ĉi tie mankis oksigeno kaj la komuniko estis malfacila pro altaj montoj. Troviĝis nur kelkaj barakoj. Kiel dirite en la popol-kanto cirkulanta inter lokaj amasoj, en Maĉala la montoj estas altaj kaj neĝostormoj furiozaj, de la antikveco mankas loĝantoj.

La unua generacio de ministoj en Tibeto firme diris: "Ni venas por ekspluati karbominon por la

popolo, do Maĉala estas nia hejmo." Por gajni gloron por la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, ili firme decidis elfosi karbon en Tibeto.

La veteranaj ministoj Haŭ Lianfang kaj Ĝang Kifa devenintaj el malriĉkamparana familio gvidis la aliajn ministojn fari, kun ŝtalstangoj kaj marteloj en la manoj, militiron al la montoj. Strikte unuiginte kaj luktante en malfaciloj, la hanaj kaj tibetaj laboristoj fine trovis karbon en neĝaj montoj altaj je pli ol 5,000 metroj super la marnivelo per siaj diligentaj manoj kaj tiel malfermis la trezorejon de Maĉala.

*Hana laboristo fervore instruas tibetajn laboristojn manipuli elektran aparaton por karbominejo.*





*Ĝang Ĉuanhjun (la meza), estro de la karbomineja revolucia komitato kaj arma reprezentanto interparolas kun tibetaj kaj hanaj laboristoj pri komprenaĵoj en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ.*

La laboristoj ekzaltiĝis pro la trovo. Sed iuj diris, ke “la karbo de Maĉala, malpli bruligebla ol bovfekaĵo, neniel taŭgas por hejtado”. Ili intencis per tio ŝanceli la decidon de la ministoj. Por daŭrigi la aferon, veterana laboristo Ĝaŭ Venhi persone provis elfositan karbon kaj konstatis ke la karbo de Maĉala estas tre bona en kvalito. Krome, kun la karbo li kaj aliaj transpaŝinte montojn venis al cementa fabriko por prova hejtado en produktado. Dank’ al fervora helpo de la laboristoj, estis produktita la cemento n-ro 400 per la alportita karbo.

Kvankam estis trovita karbo, tamen geologia materialo pri la karbotavoloj estis ne sufiĉa kaj mankis tie mekanikaj ekipaĵoj. Kion fari? Ĉu oni konstruu la minejon per siaj saĝo kaj manoj aŭ etendu la manon por peti ekipaĵojn kaj teknikistojn? La ministoj decidis ne preni pretan manĝon, sed iri la vojon de sinapogo sur la propraj fortoj.

Dank’ al helpo de ĈPLA-anoj senditaj al ili por subteni la maldekstrulojn, la revolucia komitato de

la minejo organizis teknikan grupon de “triflanka kombiniĝo” kun partopreno de veteranaj laboristoj, revoluciaj kadroj kaj teknikaj laborantoj por kolekti materialojn kaj mem fari projekton kaj bluplanojn.

Al la minejo mankis ligno por konstrui minajn galeriojn, do ĉiuj iris en neĝo al montoj por haki arbojn spite de rigora frosto de 30° C sub nulo.

Al la minejo mankis elektro por lumigo, ili mem projektis kaj konstruis malgrandan hidroelektran stacion.

Mankis ankaŭ instrumentoj por fosado, majstro Liang Deĉun, kiu pasinte estis forĝisto, gvidis tibetajn metilernantojn mem fari instrumentojn, kaj tiel ili provizis la minejon per instrumentoj por fosado.

En januaro de la kuranta jaro, la plej malvarma sezono en Maĉala, la ministoj komencis laboron fosi galerion por eltiri karbon. Sur la montoj altaj je



5,000 metroj super la marnivelo furiozis neĝoŝtormo kaj frostiĝis la tero. La unua generacio de ministoj en Tibeto sentime marŝis antaŭen renkonte al malfaciloj. La ĈPLA-anoj tie subtenantaj la maldestrulojn kaj membroj de la mineja revolucia komitato, kun kaskoj el vimenoj sur la kapo kaj *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* en la sino, iris en ŝaktojn por propagandi Maŭzedongpenson kaj persone komandi la batalon.

Apenaŭ komenciĝis la batalo, ili tuj renkontis malmolan rokon. Venkinte ĝin, ili renkontis malkompaktan tertavolon. En la galerio senĉese okazis terfalado desupre kaj deflanke. Tio influis la rapidecon de fosado kaj minacis la sekurecon. Dank' al atenta observado kaj penema esplorado, la ministoj fine kreis laborprocedon, kiu helpis venki terfaladon kaj garantiis la sekurecon.

Post tio ili renkontis subteran akvon. En la galerio ŝprucis akvaj kolonoj. La subtera akvo glaciĝis antaŭ ol flui malpli ol 50 metrojn.

Fronte al tia malfacilo, veterana laboristo Liu Binghin, membro de la mineja revolucia komitato, rakontis la historion pri la senkompare malfacila batalo de la 25,000-lia Longa Marŝo de la Ruĝa Armeo sub gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, por kuraĝigi la ministojn. Edifite de la historio tiuj diris firme: "Kun sentimo al manko de oksigeno sur altaj montoj ni hardas la ruĝan koron en frosta neĝoŝtormo. Por elfosi pli multe da bona karbo por la popolo, ni volentas eĉ elverŝi nian tutan sangon!"

La sunbrilo de Maŭzedongpenso varmigas la koron de la ministoj, tiel ke ili venkis froston kaj ĉiujn malfacilojn kaj senĉese renovigis la produktan rekordon.

## Horaro de la Esperanta Disaŭdigo de Radio Pekino

<b>Pekina Tempo</b>	<b>GMT</b>	<b>Al Regionoj</b>	<b>Ondoj (m)</b>
Sabato kaj Dimanĉo 4:00-4:30	Vendredo kaj Sabato 20:00-20:30	Eŭropo	47 45 25
Sabato kaj Dimanĉo 19:00-19:30		Japanio, Koreio	47 40
Sabato kaj Dimanĉo 20:30-21:00		Sudorienta Azio	25 19




## PONTEGO SUPER MINGIANG-RIVERO MALFERMIĜIS AL TRAFIKO

Je la 30-a de junio de la kuranta jaro, la Pontego super Mingiang-rivero ĉe la urbo Fuĝoŭ venke malfermiĝis al trafiko. Tiu ferbetona ŝosea ponto (inkluzive de la kondukaj partoj) longas 840 metrojn kaj larĝas 10 metrojn.

Antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio, super Mingiang-rivero ĉe Fuĝoŭ estis nur malnova mallarĝa Vanŝoŭ-ponto por interligi la trafikajn liniojn sude kaj norde de la rivero kaj ĝi neniel povis plenumi la bezonojn de la disvolviĝo de la industria kaj agrikultura produkto.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la revoluciaj komitatoj de Fugian-provinco kaj la urbo Fuĝoŭ decidis konstrui ŝosean pontegon super Mingiang-rivero por pli bone efektivi la grandan strategian principon de Prezidanto Maŭ “sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo”, starigis komandojn de la konstruejo kaj oficiale inaŭguris la konstruadon en decembro de 1969. Sekvante la grandan instruon de Prezidanto Maŭ “la popolamasoj posedas senliman korean povon”, ĝi firme sin apogis sur la amasoj, energie kondukis amasan movadon kaj plene mobilizis la revoluciajn aktivecon kaj kreivon de la vastaj amasoj. Oni finkonstruis la ŝosean pontegon en nur iom pli ol duonjaro, t. e. tri monatojn antaŭ la fiksita dato. Tiu pontego estas ne nur konstruita rapide per malmulta mono, sed ankaŭ estas bona en kvalito. Ĝia finkonstruiĝo plifortigis la interligon de la trafikaj linioj sude kaj norde de Fugian-provinco kaj havas grandan signifon en politiko kaj ekonomio.

*La ceremonio de la sukcesa malfermo al trafiko de Pontego super Mingiang-rivero ĉe la urbo Fuĝoŭ.*





# Triumfa Kanto de la Petrola Urbo Maŭming

**MAŬMING** estas petrola urbo en la suda parto de nia lando. Ĝi produktas petrolon kaj petrolajn fabrikaĵojn urĝe bezonatajn de nia lando.

Ĝi estas laŭdata kiel urbo kun la heroeco, stilo kaj spirito de Daking kaj estas elektita kiel ruĝa standardo de Guangdong-provinco en "lerno de Daking en industrio".

## DE LA ANTAŬENSALTEGO ĜIS LA NOVA ALTA TAJDO

La petrola urbo Maŭming estis konstruita en la antaŭensaltego de 1958.

Parolante pri la jaro 1958, la laboristoj de la petrola urbo tuj pleniĝas de emocio kaj entuziasmo. Ili diris, ke sen la antaŭensaltego de 1958, ne povas esti la nova urbo Maŭming nek povas esti artefarita petrolo de tiu urbo. Antaŭ la Liberiĝo, en tiu loko:

*Subtere kaŝas sin trezoro,  
Sur ter' ne kreskas herb' aŭ floro,  
Sekec', inund' kaj tondroj plagas,  
Kaj l' malriĉuloj fuĝas, vagas.*

En la komenco de la jaro 1958, tiu loko ankoraŭ estis dezerta. Spite al la varmego de 30° - 40° C, la heroaj konstruantoj de la petrola urbo rapide malfermis la subteran trezorejon, sukcese konstruis liberĉielan minejon de oleskisto kaj en la jaro 1960 starigis tie la unuan distilan fornon de oleskisto, per kiu ili unufoje produktis artefaritan petrolon en suda Ĉinio.

Sed klasa batalo ne turniĝas laŭ homa volo. Kiam la konstruantoj pretis antaŭenmarŝi grandpaŝe post akiro de iom da sperto, la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki levis diablan venton de "deĉevaligo de la petrola urbo" kun la vana provo malhelpi ĝian disvolvon.

Vizaĝe al tiu situacio, tre maltrankviliĝis la vastaj amasoj de la revoluciaj laboristoj kaj kadroj de la petrola urbo. Ili foje kaj refoje studis la grandan instruon de Prezidanto Maŭ pri **penema luktado en malfaciloj kaj sinapogo sur propraj fortoj**, lernis la revolucian spiriton de la daking-anoj konstruadi peneme en malfaciloj sur la stepo sen ŝirmo kontraŭ pluvo kaj frosta vento. Ili diris kun firma volo: "La petrola urbo ne devas deĉevaliĝi kaj la produkto de artefarita petrolo devas disvolviĝi. Ni nepre persistos plue en tio."

La Granda Proletara Kultura Revolucio persone iniciatita kaj gvidata de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ ĝisfunde detruis la burĝaran komandeton de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki. Denove ekjuniĝas la petrola urbo Maŭming. La operacio por la starigo de ĝia tria oleskista distilforno fariĝis nova startpunkto en la historio de la konstruado de tiu petrola urbo.

Antaŭe, por konstrui la unuan distilan fornon, oni uzis du jarojn kaj duonon. Pro la interveno de la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Liu Ŝaŭki, sep jaroj estis elspezitaj pro la konstruo de la dua. Sed dank' al apliko de nova konstrua metodo, la laboristoj finkonstruis la trian fornon nur per dek monatoj en la Granda Proletara Kultura Revolucio.

## IRI LA VOJON DE SINAPOGO SUR LA PROPRAJ FORTOJ

La sukcesa finkonstruo kaj ekfunkcio de la tria forno elmetis postulon al la antaŭa laborprocedo, nome al la minekspluata branĉo: la produktokvanto de oleskisto devas kreski oble, alie oni ne povas plenumi la bezonon de la distilaj fornoj.

La heroaj ministoj ĵuris, ke ili garantios sufiĉan provizon al la fornoj sen pliigo de la ekipaĵoj kaj personaro.

Kaj tiel farite kiel dirite, la taga kaj la monata kvantoj de oleskisto produktita de la ministoj superis la plej altan nivelon en la historio.

Sed baldaŭ finkonstruiĝos la kvara forno kaj ankaŭ la konstruo de pli multaj distilfornoj estas metita en la tagordon. Se oni aplikus la antaŭan metodon de minekspluato kiel kutime, oni devus konstrui aldone ĉirkaŭ cent liojn da fervojo kaj pliigi konforme al tio lokomotivojn, memmalŝarĝajn vagonojn kaj elektrajn fosilojn, sole por plenumi la bezonon de la kvara forno. Kaj por tiu konstruo oni bezonus grandan kvanton da ŝtalaj materialoj kaj grandan kvanton da investo de la ŝtato.

Tiutempe, respondeculoj de la petrola urbo venis al la liberĉiela minejo kaj kuraĝigis la ministojn elfosi oleskiston kun revolucia spirito. Kaj krome ili proponis apliki hidraŭlikan metodon anstataŭ la malnovan kaj tiamaniere elŝpari fervojon, lokomotivojn, elektrajn fosilojn kaj memmalŝarĝajn vagonojn por alilokaj urĝaj bezonoj.

Tiel frue kiel en la komenco de la konstruado de la petrola urbo, inĝenieroj kaj teknikistoj de nia lando jam proponis fosi oleskiston hidraŭlike. Sed tiam oni ne aplikis tiun metodon. Fremdlandaj "specialistoj" diris, ke en Maŭming ne estas akvo, tial oni ne povas produkti hidraŭlike, kaj krome la kohereco de la grundo de Maŭming estas granda kaj en la tertavoloj troviĝas malmolaj ardezoj, kiujn oni ne povus disrompi, eĉ se oni povus akiri akvon.

La Granda Proletara Kultura Revolucio plene disvolvis la saĝon kaj talenton de la laboristoj de la petrola urbo. Denove oni proponis konsideri la hidraŭlikan elfoson de oleskisto. La laboristoj decidis fari esploradon kaj mem fari praktikadon en tio.

La ministoj organizis grupon por serĉado de akvofonto. Spite al la alta temperaturo subtropika, la grupo faris detalan esploron kaj mezuradon pri la riveroj en la areo de kelkdek kvadrataj kilometroj de Maŭming. Ili vizitis dekojn da vilaĝoj laŭlonge de la riveroj kaj petis informojn de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj. Ili aranĝis kunsidojn de akvoutiligaj laborantoj kaj legis hidrologiajn dokumentojn de dekoj da jaroj. Kaj post penado de pli ol tri monatoj, ili fine trovis idealan akvofonton, kiu havas neelĉerpeblan akvon. Kaj poste, sukcese solviĝis ankaŭ la problemo de ejo por formeti teron. La laboristoj de la petrola urbo rapidege komencis la fundamentan konstruadon de hidraŭlika ekspluato.

## MARŜO AL LA PROFUNDECO KAJ VASTEKO DE PRODUKTADO

Sub la direktado de la brila penso de Prezidanto Maŭ "sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo", prenante la lokajn riĉfontojn kaj ekzistantajn kondiĉojn kiel elirpunkton, la laboristoj de la petrola urbo energie klopodas por sinteza utiligo en petrola industrio kaj kreis grandan kvanton da riĉaĵoj por la ŝtato. Ekzemple, ili sukcesis ekstrakti koloran metalon el skorio de oleskisto.

En skorio de oleskisto post distilado troviĝas speco de kolora metalo. La Maŭming-a Urba Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la partia komitato de la Petrola Kompanio de Maŭming firme subtenas la revolucian spiriton de la laboristoj kuraĝi pensi kaj kuraĝi agi, kiuj faris pli ol 360 eksperimentojn en mallonga periodo de nur kelkaj monatoj, akiris milojn da donitaĵoj, venkis unun post alia malfacilojn en tekniko kaj finfine sukcesis ekstrakti la gravan koloran metalon el oleskista skorio. Kaj poste, ili faris interan produktan eksperimenton kaj kreis novan teknologian procedon por grandskala produkto.

La Tria Kemia Eksperimenta Fabriko de Maŭming, kiu sukcesis ekstrakti gravajn kemiajn materialojn kiaj benzeno kaj tolueno, estas malgranda fabriko starigita nur dank' al la penema luktado de la laboristoj. La plejparto de la ekipaĵoj de tiu fabriko estas faritaj el revivigitaj eluzitaj materialoj kaj ekipaĵoj. Por konstrui la ferbetonan soklon de iu ronda forno, la laboristoj bezonis pli ol du tunojn da skeletfero. Ili ne postulis tion de la ŝtato. Ili elfosis difektitajn ferbetonajn platojn el iu fosajo, ilin pene frakasis per martelegoj en kvin tagoj kaj noktoj, akiris pli ol du tunojn da skeletfero kaj plenumis la bezonon de konstruado de la soklo de la ronda forno. Ili devis konstrui multajn tubliniojn, ili do elfosis senutilajn akvokondukajn tubojn jam difektitajn kaj ilin kunveldis pecon post peco por daŭra uzo. Iuj el la tuboj jam havis truojn en si, ili do ŝtopis tiujn truojn. Ĝuste per tiaj mem kreitaj manieroj kaj ekipaĵoj tiu malgranda fabriko estas konstruita en mallonga tempo, kaj ĝi kreis novan teknologion por produkti benzenon el oleskista pulvoro senutila kaj sukcesis produkti altklasajn kemiajn materialojn.

En la granda periodo de la sepdekaj jaroj, la vasta laborista klaso de la petrola urbo Maŭming decidis batalakiri ankoraŭ pli grandan venkon en konstruado de la petrola industrio kaj fari ankoraŭ pli grandan kontribuon por la socialisma afero de la patrolando.



# Naskiĝo de Brakhorloĝoj de

## Marko "Ŝanhajo"

**S**UB la gvido de la Partio, persistante ĉe la revolucia vojo montrita de Prezidanto Maŭ "sinapogo sur propraj fortoj" kaj "penema luktado en malfaciloj", la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj de la Ŝanhaja Brakhorloĝa Fabriko elfaris diversajn altklasajn brakhorloĝojn, kaj tiel plenigis por nia lando la blankan punkton en la brakhorloĝa industrio.

En 1955, kelkdek laboristoj de horloĝa fabriko kaj horloĝriparistoj de Ŝanhajo komencis provfabrikan de brakhorloĝo en iu malnova fabrika domo. Inter ili neniuj fabrikis brakhorloĝon en la pasinteco. Ili havis nenian specialan ekipaĵon krom unu simpla tornilo por riparo de horloĝoj kaj kelkaj ŝraŭbteniloj kaj fajliloj.

Tuj en la komenco de provfabriko, iuj jam proponis importi ekipaĵojn kaj dungi fremdlandajn specialistojn kiel konsilistojn. La laboristoj firme oponis kontraŭ tiu propono. Iu veterana laboristo, kiu riparis brakhorloĝojn kelkdek jarojn, diris: "Tiu vojo estis irita de ĉinaj kapitalistoj jam antaŭ la Liberiĝo, sed ili eĉ unu brakhorloĝon ne sukcesis elfari post kelkdekjara penado." Laboristoj de la horloĝa fabriko diris: "Per niaj propraj manoj ni jam elfaris horloĝojn, do ni certe povos elfari brakhorloĝojn."

Prenante la verkojn de Prezidanto Maŭ [*Pri Praktiko kaj Pri Kontraŭdiro* kiel armilojn kaj disvolvante la spiriton kuraĝi pensi kaj kuraĝi agi, la laboristoj malmuntis malnovajn brakhorloĝojn,



*Angulo de la munta laborejo*

faris analizon kaj esploron kaj mem desegnis la pecojn de brakhorloĝo. Post dumonata klopodo ili sukcesis provfabriki la unuajn brakhorloĝojn de nia lando duonmetie kaj duonmekanike.

Por produkti pli multajn bonkvalitajn brakhorloĝojn, la laboristoj senĉese plibonigis sian laboron, faris desegnaĵojn de ĉiuj pli ol 150 pecoj de brakhorloĝo, projektis prilaboran teknologion de pli ol 1,070 procedoj kaj necesajn ekipaĵojn, kaj per tio akiris kompletan da teknikaj materialoj pri brakhorloĝa produktado. Samtempe kun tio, rapide kreskis nia unua generacio de laboristoj mastrantaj la produktan teknikon de brakhorloĝo.

En la granda antaŭensalto de 1958, oficiale komenciĝis la produkto de kontraŭakva brakhorloĝo de marko "Ŝanhajo" kun 17 juveloj kaj longa sekunda montrilo. Apenaŭ veninte en la mondon, la brakhorloĝo ĝuis varman bonvenigon de la vastaj amasoj. Ili arde deziris grandkvantan produkton de tia brakhorloĝo.

Por pligrandigi la produkton de brakhorloĝoj oni devis havigi al si aldone kompletajn ekipaĵojn kaj instrumentojn kaj fiksilojn. De kie oni ilin akiru?

La laboristoj decidis mem fari ekipaĵojn. En la fabriko rapide levigis varma tajdo de amasa teknika renovigo kaj memfarado de ekipaĵoj. Dank' al ilia penado multaj ŝlosilaj ekipaĵoj kaj metaltranĉiloj kaj gaŭĝoj altklasaj, precizaj kaj malgrandaj estis fabrikitaj en mallonga tempo.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, pli memkonscie plenumante la orientilon de apliko de indiĝenaj metodoj kaj samtempa apliko de indiĝenaj kaj modernaj metodoj, la revoluciaj laboristoj de la Ŝanhaja Brakhorloĝa Fabriko mem projektis kaj fabrikis ekipaĵojn. En la premformiga laborejo estis importita tornilo por fari brakhorloĝajn kadrojn por kiu oni elspezis sepdek mil *yuan*. La laboristoj kaj teknikistoj mem projektis kaj fabrikis 20 tiajn tornilojn kun sama kapablo sed por ĉiu el ili oni uzis nur 1,800 *yuan*. Ĉiuj diris kun profunda kompreno: "Vere bonaj estas la ekipaĵoj de ni mem fabrikitaj; politike ili levis nian kapon kaj ekonomie enkorpiĝis la principon '**multe, rapide, bone kaj ekonomie**'." Ankaŭ aliaj laborejoj fabrikis ekipaĵojn, instrumentojn kaj fiksilojn laŭ la bezono de produkto. En 1969, la Ŝanhaja Brakhorloĝa Fabriko mem fabrikis pli ol 100 maŝinojn de 18 specoj kaj per tiuj plene kontentigis sian bezonon en disvolvo de



*Laboristinoj ekzamenas brakhorloĝojn.*

produkto. Iuj maŝinoj estas multe pli bonaj ol fremdlandaj, sed kun malpli multe da memkostoj.

En la procezo de fabriko de ekipaĵoj, aplikante la bonajn punktojn kaj plene konante la mankojn de importitaj maŝinoj en sia produkta praktiko, la laboristoj senĉese riparigis la mankojn laŭ la principo "**utiligo de fremdlandaj en servo al Ĉinio**". La fabriko antaŭe havis importitan instrumenton por ĝustigi la frekvencon de oscilaj sistemoj kun strukturo komplika, manipulado neoportuna kaj efikeco tre malgranda. La laboristoj decidis reformi ĝin. Aplikante la principon de aŭtomata ĝustigo de la importita instrumento kaj ŝanĝante ĝian komplikan strukturon, ili fabrikis unun post alia sep malgrandajn, sed tre taŭgajn instrumentojn por ĝustigo de la frekvenco de oscilaj sistemoj, kaj ĉiu el ili memkostas nur 2-3% de la importita.

En la komenco de la kuranta jaro, per iom pli ol monato, la projekta grupo de triflanka kombiniĝo kun laboristoj kiel la ĉefa parto sukcese projektis kaj provfabrikis novtipan brakhorloĝon facile prilaboreblan kun avangarda strukturo kaj alta kapablo, per kio ĝi levis nian produkton de brakhorloĝoj al nova nivelo.



# Nova Startpunkto

Profesoro Guo Kehin, sciencisto de la Metala Instituto  
de la Ĉina Akademio de Sciencoj



*La verkinto de la artikolo staras apud la paramagneta resonatoro kaj donas konsilon al junaj scienc-teknikaj laborantoj kiel fari scian eksperimenton.*

**L**A Granda Proletara Kultura Revolucio, persone iniciatita kaj gvidata de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, jam gajnis grandan venkon. Tiu granda revolucio, kiu tuŝas la animon de la homoj, “**havas tre grandan signifon por la ideologia revoluciigo de la tutlanda popolo**” kaj multe hardis niajn intelektulojn en nombro de milionoj, tiel ke profunde ŝanĝiĝis ilia ideologia fizionomio. Ĝuste estas la uragano de la granda revolucio, kiu igis min disradii revolucion junecon.

Prezidanto Maŭ de ĉiam alte taksas kaj fidus la intelektulojn. En 1956, el patriotisma motivo mi revenis en la sinon de la patrolando de malproksima Eŭropo kaj suriris la vojon revolucion. La ĉiam pli granda progreso de la patrolando forte kuraĝigis min kaj mi arde deziris fari kontribuon por la socialisma patrolando. Sed, ĉar mi kreskis en la malnova socio, ricevis kapitalisman edukadon kaj poste laboris multajn jarojn en universitato kaj instituto de Svedio kaj estis infektita de

*La verkinto iris el la domo de scienca esploro kaj profundigis en la fabrikon. Jen li laboras kaj entreprenas eksperimenton de nova speco de ŝtalo kune kun laboristoj.*



forta individuismo, mi estis longe trompita de la hipokrita burĝara slogano “libero en sciencaj studoj” kaj pasie strebis al famo kaj profito. Post reveno al la patrolando, mi cetere ne donis atenton por energie lerni Maŭzedongpenson, la burĝara mondkoncepto en mi ne estis ĝisfunde transformita, tial mi estis facile venenita de la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki en sciencaj esploroj kaj iris nemalmultajn kurbajn vojojn, vanigante la esperon de la Partio kaj la popolo sur mi.

Tiam, mi pensis, ke sub la socialisma sistemo ĉio, kion mi faras, estas nature en servo al socialismo, se mi nur diligente laboras. Mi ne vidis, ke oni ne povas bone plenumi sian laboron aŭ eĉ faras malbonon, se oni havas nur bonan deziron sed ne firman, ĝustan direkton politikan. Ni prenu la disvolvon de la sistemo de alojaj ŝtaloj kun ĉina karakterizaĵo, kiel ekzemplon. Tio estas grava afero kun granda strategia signifo por la starigo de nia industria sistemo sendependa kaj memstara. Mi faris esploradon pri alojaj ŝtaloj dum multaj jaroj, do mi nature devis aktive preni sur min tiun taskon kaj fari mian kontribuon. Sed sub la direktado de la penso de “libero en sciencaj studoj”

kaj “personaj famo kaj profito”, mi opiniis, ke tio ne havas multan “valoron en scienco”. Elirante el persona intereso, mi energie okupiĝis pri pure teoriaj esploroj aparte de la aktuala praktiko, forlasis la socialisman direkton kaj vane perdis tempon malutile al la revolucia afero. Ĝuste kiel Prezidanto Maŭ montris: **“Kiom ajn riĉa estas la scienca scio, sen ĝusta direkto ĝi valoras nenion.”** En la Granda Proletara Kultura Revolucio, dank’ al la helpo de la revoluciaj amasoj, mi foje kaj refoje studis la grandan instruon de Prezidanto Maŭ, ke **“manko de ĝusta vidpunkto politika egalas al malesto de animo”**, kaj profunde ekkomprenis, ke la scienco kaj tekniko ĉiam servas al certa klaso kaj ne ekzistas fakte scienco por scienco aŭ scienco superklasa. Mi iris kurban vojon, ĝuste pro **“manko de ĝusta vidpunkto politika”** kaj manko de penso tutkore kaj plenanime servi al la popolo, kaj mia starpunkto ankoraŭ ne estas transmetita al la flanko de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, laborista propagando taĉmento de Maŭzedongpenso eniris la Metalan Instituton. La taĉmentoj reformis la postenon de scienca esploro per



Maŭzedongpenso kaj laŭ la granda instruo de Prezidanto Maŭ, ke la intelektuloj nepre devas sin kombini kun la laboristoj kaj kamparanoj, ili gvidis la vastajn amasojn de sciencaj kaj teknikaj laborantoj iri el la sciencesploraj domegoj al kamparo por partopreni fizikan laboron kaj ricevi reedukon fare de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Kiam ni venis al la kamparo, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj entuziasme bonvenigis nin. Kaj poste dum laborado, ili instruis al ni kiel labori kaj samtempe diris al ni: "Utilaj estas vi altklasaj intelektuloj, tamen vi nepre devas ĝisfunde remuldi vian mondkoncepton kaj tutkore kaj plenanime servi al la popolo laŭ la vortoj de Prezidanto Maŭ." Tiuj malmultaj vortoj forte min kuraĝigis kaj spronis. Kiel profunde la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj komprenis la grandan instruon de Prezidanto Maŭ rilate al la politiko pri intelektuloj! Ili ankaŭ ofte rakontis siajn suferojn en la malnova socio kaj la kruelajn ekspluaton kaj subpremon faritajn de la bienularo en kontrasto kun la feliĉo, kiun ili ĝuas dank' al ekteno de la regpotenco sub la gvido de la Partio kaj Prezidanto Maŭ post la Liberiĝo. El tio mi ricevis plej vivecan kaj plej solidan klasan edukon. Nur tiam mi vere ekkomprenis, kio estas klaso, kio estas ekspluato, kaj kio estas revolucio. Ankaŭ la demandoj, kiu vivtenas kiun, kaj kiun oni devas servi, ofte aperis en mia cerbo. Post veno al la kamparo, mi trovis, ke mi eĉ ne povas bone manipuli sarkilon, kaj ke mi jen postlasas sarkendajn herbojn jen vundas plantidojn dum sarkado. Sed la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj sarkas rapide kaj lerte kaj same tiel faras ankaŭ en aliaj terkulturaj laboroj. En la pasinteco mi fieris pro tio ke mi havas specialan lertecon en profesio, sed kiam mi ekprenis sarkilon, mi tuj sentis min malgrandioza kaj tuj forvaporigis mia grava teniĝo de intelektulo. Nur dank' al nutrado per la sango kaj ŝvito de la laboranta popolo, la intelektuloj, kia mi, kies manoj ne povas levi pezaĵon kaj kies ŝultroj ne povas vektporti, havas la eblon akiri por si sciencajn sciojn kaj laborkapablojn. Mi devas oferi miajn sciojn kaj kapablojn al la laboranta popolo kaj servi tutkore kaj plenanime al ĝi kaj al la socialisma patrolando.

Antaŭnelonge, laŭ la granda instruo de Prezidanto Maŭ "**sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj**", ni kaj kamaradoj laboristoj kune rompis fremdlandajn rutinajn regulojn, iris nian propran vojon de disvolvo de scienco kaj tekniko kaj rapide sukcesis en esploro pri kaj prov-

produkto de nova speco de aloja ŝtalo uzata por fari lagrojn, konforma al la riĉfontoj de nia lando. Tiu ŝtalo superis la tradician kromoŝtalon por lagro en kapitalismaj landoj, kaj en teknikaj normoj kaj en la vivlongeco de lagroj el ĝi. Dum mia kombiniĝo kun la laboristoj, mi profunde kortuŝiĝis de ilia ĝisfunda revolucia spirito kaj tre admiris iliajn riĉajn praktikajn spertojn. El multaj vivecaj faktoj mi komprenis, ke intelektuloj ne povas tutkore kaj plenanime servi al la popolo nek fari indajn kontribuojn al la socialisma afero de la patrolando, se ili "**ne forjetas kion ili akiris en la pasinteco kaj ne substituas ĝin per la mondkoncepto de la proletaro**". Kiam mi iom progresis, la Revolucia Komitato de la Metala Instituto min kuraĝigis ĝustatempe kaj asignis al mi la gvidan laboron de esplora sekcio por respondeci pri la laboroj de metala fiziko.

Retrorigardante la vojon iritan, mi sentas koran dankon al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Ja estas la Granda Proletara Kultura Revolucio persone iniciatita kaj gvidata de nia amata Prezidanto Maŭ, kiu liberigis min el la kateno de la reviziisma linio, montris al mi la direkton de antaŭenmarŝo kaj donis al mi revolucian junecon. Same kiel mi, ankaŭ la vastaj amasoj de intelektuloj de la Metala Instituto estas harditaj kaj provitaj de la batalo inter la du klasoj, inter la du vojoj kaj inter la du linioj, en la Granda Proletara Kultura Revolucio. La vasta popularigo de Maŭzedongpenso forte akcelis la ideologian revoluciigon de la intelektuloj kaj profunda revolucia ŝanĝo okazis en la spirita fizionomio de la homoj. Nun sane kreskas niaj proletaraj sciencistaj kaj teknikistaj vicoj.

Ekde la Granda Proletara Kultura Revolucio, impete disvolviĝis la sciencaj esploraj laboroj de nia instituto kiuj donis fortan subtenon al la industria kaj agrikultura konstruado. En la kuranta jaro, nia instituto kreis alian novan specon de ŝtalo baziĝante sur riĉfontoj de nia propra lando. Dank' al praktiko de triflanka kombiniĝo inter laboristoj, kadroj kaj teknikistoj, ni uzis nur kelkajn monatojn por fini la tutajn procedojn de laboratoria esplorado ĝis pogranda produkto. Tia rapida sukceso estis senprecedenca. Nun en nia Metala Instituto jam formiĝis amasa movado de teknika renovigo kaj teknika revolucio kaj alvenas alta tajdo de granda antaŭensalto en sciencaj esploroj. Por respondi al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ ke "**Ĉinio devas fari relative grandan kontribuon al la homaro**", ni estas venke marŝantaj per gigantaj paŝoj al la celo "**kuratingi kaj superi la avangardajn nivelojn de la mondo**".

# Kuraci Malsanojn

## por Komunumanoj

**E**N la komenco de 1969, mi venis de la Unua Hospitalo de la urbo Fuŝun al Hoŭ-an-brigado, Fuŝun-gubernio, por tie fiksloĝiĝi. El mia unujara kuracista praktikado, mi profunde komprenas, ke intelektuloj povas bone servi al la laboranta popolo kaj esti bonvenaj al ĝi, nur se ili ĝisfunde remuldas sian mondkoncepton laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ “**nepre devi iri por longa tempo, senrezerve kaj tutkore inter la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn**”.

Mi diplomiĝis en la Dalian-a Medicina Kolegio en 1963. Kiam mi ĵus venis al la montregiono, venenite de la reviziismaj ideoj de la renegato Liu Ŝaŭki, kia “tekniko la unua”, mi pensis en mi ke, dank’ al mia tekniko mi estas bonvena ĉie, kien mi iras. Sed la faktoj instruis al mi, ke sen ĝusta politika direkto oni ne povas tutkore kaj plenanime servi al la popolo malgraŭ ke oni posedas teknikon.

Foje mi venis al Ĝenggia-brigado en kuraca rondirado. La malriĉkamparanino onklino Ding invitis min al sia hejmo por kuraci onklon Ding, kiu suferis de paralizo jam tri jarojn. Mi ekzamenis lin kaj trovis ke lia vidkapablo ekstreme malfortiĝis kaj liaj gamboj troviĝas en rigideca paralizo. La onklino montris al mi la diagnozajn skribojn de kelkaj grandaj hospitaloj, kies unueca konkludo estas “encefala tumoron en posta periodo”. Mi do diris: “Vian malsanon, onklo, kaŭzis la encefala tumoron, mi prezentu vin al iu granda hospitalo en urbo por ricevi operacion!” Aŭdinte tion, la onklo fariĝis tre malkontenta kaj diris: “Se vi ne povas kuraci la malsanon, do lasu ĝin. Ne parolu pri operacio. Iu kuracisto de granda hospitalo en urbo jam diris al mi: ‘La malsano povas esti kuracita nur per operacio. Por fari operacion oni sciu antaŭ ĉio: unue, la rezulto de la operacio ne povas esti garantiata; due, la operacio kaŭzos stultiĝon; kaj trie, pagi 200 *yuan* antaŭ la

operacio.’ Diru, ĉu tio estas por kuraco de malsano? Ĝi estas simple obstaklo!” Mi aŭdis kion li diris, tamen, mi ne faris klopodon por kuraci lin.

Post unu monato mi denove venis al tiu brigado. Subite mi renkontis la malsanulon sur la strato. Post pridemando, mi informiĝis ke lian malsanon forigis iu “nudpieda kuracisto” per arĝenta akupunktura pikilo. Mi ne povis ne demandi al mi, kial mi kuracisto studinta en medicina kolegio ne povis kuraci la malsanulon, kiun “nudpieda kuracisto” kun klereco de elementa lernejo resanigis. Kun tiu demando mi ripetade studis la brilan verkon de Prezidanto Maŭ *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*. Prezidanto Maŭ instruis: “**La problemo por kiuj estas problemo fundamenta, problemo de principo.**” La instruo de Prezidanto Maŭ komprenigis al mi ke antaŭ ol solvo de la fundamenta problemo “por kiuj”, ne eblas plene disvolvi la efikon de tekniko.

Ekkompreninte tion, mi turnis mian atenton al remuldo de mia mondkoncepto. Iun julian vesperon lastajare, Deng Vanĉun, komunumano-malriĉkamparano de Tong-an-brigado, estis portita al la hospitalo pro subita fortega ventrodoloro. Diagnozo evidentigis borantan ulceron de stomako kun samtempa inflamo de peritoneo. La paciento jam troviĝis en stato de ŝoko. Tuja operacio estis necesa por savi lin el danĝero. Sed tian operacion mi neniam faris sub la kondiĉoj de kamparo. Ĉu ne estos makulo al mia propra honoro, se okazos eventualaĵo? Mi pensis ke prefere estas sendi lin al granda hospitalo en urbo. Tamen, mi pensis ankaŭ, kion fari, se kriziĝus la malsano sur la vojo, ĉar oni devis trairi cent liojn da montvojo por veni al urbo. “Forsendi” aŭ “akcepti”, jen estas dividlinio por provi al kiu mi dediĉas mian laboron, al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj aŭ al mi mem? Tiam min ekstimulis la



granda instruo **“kompleta sindono al aliaj sen ajna konsidero pri si mem”**. Mi disŝiris la duonskribitan formulon pri transsendo de paciento kaj tuj komencis fari operacion por la malsanulo. Sub la komuna klopodo de la tuta hospitalo kaj post streĉa batalo, estis sukcese farita la operacio. Kaj la paciento estis savita.

Estis la unua fojo por mi fari relative komplikitan operacion en simpla kabano, sub kondiĉoj de manko de instrumentoj. El tio mi plie ekkomprenis, ke revoluciaj kuracistoj devas transmeti sian starpunkton al la flanko de la laboranta popolo en sia praktika laboro kaj en sia servado al ĝi.

Havante deziron servi al la laboranta popolo, oni tamen ne povas ĝin efektiviĝi sen kuracaj rimedoj konformaj al la kondiĉoj en kamparo.

Foje iu komunumano-malriĉkamparano suferis de stomaka ulcero kun samtempa pilorobstrukco, malfaciliganta prenon de manĝo kaj akvo. Antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio, pli ol 20 fojojn li petis kuracan helpon ĉe grandaj hospitaloj, sed tiuj rifuzis lin per la preteksto de manko de malsanula lito kaj aliaj. Akcepti lin aŭ ne? Operacii lin aŭ ne? Pri tio la tuta hospitalo havis grandan debaton. Iuj diris: “Ne eblas fari tian operacion sen moderne ekipita ĥirurgia ĉambro.” Aliaj kontraŭargumentis: “Ni devas krei serion da ekzamenaj kaj kuracaj rimedoj konformaj al la kamparaj kondiĉoj por doni kuracajn helpojn al la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.” Poste ĉiuj venis al la sama opinio, ke sub la nunaj kondiĉoj klopodi ĉiurimede por kuraci la malsanojn de la amasoj estas tre urĝa tasko por ni. Unuiginte opinion, ni decidis akcepti la pacienton kaj tuj fari por li operacion. Ni plene disvolvis la revolucion spiriton kaj alprenis rigore sciencan sintenon en la laboro. La kondiĉoj estis efektive tre malfacilaj tiutempe. Ne havante altpreman steriligilon, ni anstataŭe uzis aluminian kuirpoton. Ne havante sangrezervon, ni aplikis rektan transfuzon . . . Tiamaniere ni sukcese faris stomakan ektomion en la simpla ĉambro. La paciento rapide resaniĝis post la operacio kaj post unu monato jam povis labori.

Post pluraj operacioj, ni iom post iom kreis por ni serion da ekzamenaj kaj kuracaj rimedoj aplikeblaj en kamparo. Ni ankaŭ laŭeble plibonigis senĉese la medicinajn kondiĉojn por pli bone servi al la laboranta popolo. De unu jaro ni sukcese faris relative komplikajn operaciojn kiaj ektomio de stomako kaj gala veziko kaj savis pacientojn de encefala traŭmo kaj de liena rompiĝo.

Ne longe post mia alveno al la kamparo, mi sukcese faris kelkajn relative komplikajn operaciojn por malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Tiam disvastiĝis la famo: “Por kuracigi malsanon, iru al doktoro Vang, kiu resanigas malsanulojn ĉe mantuŝo.” Aŭdinte tion, mi tre flatiĝis kaj pensis ke kuraci gravajn kaj malfacilajn malsanojn kreskigas sperton kaj donas famon. Tiel, dum certa periodo, mi denove okupiĝis ekskluzive pri librolegado kaj esplorado pri malsanoj maloftaj kaj malfacile kuraceblaj. Iutage mi estis invitita por kuraci komunumanon kiu suferas de sangosputo pro astmo. Mi pensis en mi, ke “nud-piedaj kuracistoj” jam tute sufiĉas por kuraci tian ordinaran malsanon. Pro kio necesas peti mian helpon? Sed sub insista petado mi povis nur iri. Kaj mi trovis ke la malsano estas efektive tre serioza. Mi restis ĉe la pacientino tutan tagnokton kaj ne sukcesis haltigi ŝian sangospudadon, malgraŭ ke mi donis diversajn sangohaltigilojn. Feliĉe estis, ke iu maljuna malriĉkamparano rekomendis popolan preskribon. Kiam la malsanulino trinkis la dekoktaĵon de kuracherboj preskribitaj, tuj ĉesis la sangosputado kaj la pacientino iom post iom resaniĝis. Tiu okazo forte min skuis. Mi tuj iris al la maljunulo por lin konsulti. Li diris: “Ni montanoj ofte suferas de tiu malsano, tial ni de generacio al generacio klopodas trovi kontraŭrimedon por kuraci tiun malsanon. Por diri veron, doktoro, veninte al montregiono, vi ne turnis vian atenton sur tiu malsano kiu turmentis nin.”

La vortoj de la maljunulo kvazaŭ vipoj trafis miajn vundpunktojn. Mi kontrolis mian agadon per la vortoj de la malriĉkamparano. Kvankam mi kolektis iujn popolajn preskribojn, tamen, mi neniam serioze ilin studis nek solvis per ili iajn efektivajn problemojn por malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Kial? Prezidanto Maŭ montris, ke ni intelektuloj **“malofte kontaktiĝis kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, malmulte ilin komprenas aŭ pristudas, ne havas intimajn amikojn inter ili”**. La granda instruo de Prezidanto Maŭ rekte elmontras la radikon de la problemo. Kvankam mi ŝajne kontaktiĝis kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, sed fakte mi ne komprenas ilian personon kaj sentimenton, por ne paroli pri interamikiĝo intima kun ili. En analizo ĝis la fino, la kaŭzo kuŝas en tio, ke mia mondkoncepto ne esence ŝanĝiĝis.

Poste, ni iris al iu produkta grupo situanta pli ol 20 liojn fore de nia hospitalo por fari kuracon rondire kaj trovis, ke pluraj malriĉkamparanoj kaj



# Meteorologo en Produkta Brigado

**E**N Ĝitang-brigado de Naman-komunumo de Guanghi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono, estas malriĉkamparano Vej Jugang, kiun la komunumanoj nomas "meteorologo de nia brigado".

Iun tagon en 1958, subite pluvegis kaj la rapide formiĝinta monta diluvo detruis iujn irigaciajn kanalojn de la brigado. Alifoje, la sunumigata milio de la 6-a produkta grupo estis damaĝita de subita pluvego. Vej Jugang pensis en si: Kiel bone estus, se oni povus antaŭscii la ŝanĝiĝon de la vetero kaj informiĝi, kiam falos pluvo!

Sed, li estas nur ordinara kamparano, kiu neniam studis meteorologion, nek posedas sciencajn instrumentojn. Ĉu prosperos al li fari meteorologian antaŭsciigon? Li ne estis certa pri tio.

Restudinte la verkon de Prezidanto Maŭ *Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo*, li decidis ellerni la arton de meteorologia antaŭsciigo kun la revolucia spirito de la Malsaĝa Avo por servi al la agrikultura produktado.

En julio de 1964, Vej Jugang komencis persiste esplori la leĝojn de ŝanĝiĝo de la vetero sekvante

malsuperaj mezkamparanoj suferas de doloro ĉe lumbo kaj gambo. Ni vizitis dekelkajn maljunajn malriĉkamparanojn por detale informiĝi pri la estiĝo kaj kaŭzo de tiu malsano, kaj post studo ni kune kun lokaj maljunaj malriĉkamparanoj kaj "nudpiedaj kuracistoj" elpreparis tinkturon, kiu montris sian bonan efikon por resanigi tiun malsanon en apliko ĉe kelkaj pacientoj. En unu jaro ni uzis arĝentan akupunkturitan pikilon, kupon, kuracajn herbojn kaj aliajn rimedojn kaj jungis ĝenerale la lokajn malsanojn kiaj astmo, askaridozo, lumba kaj gamba doloro.

"La ŝanĝo de mondkoncepto estas ŝanĝo fundamenta." Por pli bone akcepti la reedukon fare

la instruojn de Prezidanto Maŭ preni praktikon kiel elirpunkton kaj sekvi amasan linion. Li registris atente observitajn fenomenojn de nubo, nebulo, vento kaj pluvo kaj vizitis maljunajn kamparanojn de la loko por kolekti ilian riĉan sperton en antaŭvido de veterŝanĝiĝo. Li krome detale observis kaj registris la reagojn de 17 specoj de bestoj antaŭ ŝanĝiĝo de vetero. Li akumulis meteorologiajn registrojn de 1,405 tagoj, havigis al si riĉan materialon pri la vetero kaj fenomenoj de lokaj objektoj kaj eltiris meteorologiajn leĝojn de la loko.

En la dua duono de la jaro 1966, Vej Jugang komencis provadon de vetera antaŭsciigo. De 1968, li faras antaŭsciigon en novembro de ĉiu jaro pri la ĝenerala karaktero de la vetero en la sekvonta jaro.

Iutage dum la somera rikolto en 1968, la vetero estis tute serena en la tagmezo, sed Vej Jugang antaŭvidis el la fenomenoj de la ĉielo kaj objektoj, ke nokte pluvos. Li iris al ĉiuj 16 draŝejoj de la brigado por scii ke oni en kolektu bone sian grenon. Kaj en la nokto efektive pluvis. Dank' al la antaŭzorgo, la greno de neniuj el la produktaj grupoj estis damaĝita.

La ĉiam pli ĝusta antaŭsciigo pri la vetero fare de Vej Jugang stimulis la fervoron de la komunumanoj en scienca terkulturado. En aŭgusto de 1969, el sia sperto de longtempa meteorologia observado li antaŭdiris ke "regos sekeco dum unu monato post septembro", kaj konsilis ke la produktaj grupoj faru necesajn aranĝojn kontraŭ sekeco. La partia filio de la brigado akceptis lian proponon kaj mobilizis la vastajn amasojn de komunumanoj rezervi akvon por la venonta sekeco. Dank' al tio la malfrua maizo de la brigado ne suferis de sekeco kaj donis riĉan rikolton.

Nun, sub la gvido de la partia filio de la brigado kaj helpo de la gubernia meteorologia observatorio, li jam starigis meteorologian punkton en la brigado. De kvin jaroj li ĝustatempe faras veteran antaŭsciigon de longa, mezlonga kaj mallonga periodoj kaj informas tion al ĉiuj familioj de la komunumanoj, en servo al la intereso de la popolo. Li cetere faras proponojn pri terkultura aktivado en ligo kun meteorologia stato kaj kontribuas en la disvolvo de nia socialisma agrikulturo.

de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj ĝisfunde remuldi la mondkoncepton, mi konstante iras, kunportante litaĵon, al foraj montvilaĝoj kaj tie vivas, laboras kaj lernas kune kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Mi profunde komprenas ke oni povas pli bone servi al la popolo, nur se oni modeste akceptas reedukon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj peneme remuldas sian mondkoncepton. Mi profunde ekamis la vastan kamparon kaj decidis radikiĝi en kamparo kaj marŝi antaŭen por ĉiam laŭ la vojo montrita de Prezidanto Maŭ.



# 一定要解放台湾

Yīdìng Yào Jiěfàng Táiwān

(nepre -os liberigi Tajvan)

## Ni Nepre Liberigos Tajvan

一九五零年 六月 二十七日，美帝国主义 用 武力

Yijiūwǔlíng-nián liu-yuè èrshíqī-rì, Měi-dìguózhǔyì yòng wǔlì  
 (1950 jaro 6 monato 27 tago Usono imperiismo uzi armita forto  
 La 27-an de junio 1950, la usona imperiismo tirane okupis nian teritorion

霸占了我国领土台湾，还阴谋制造“两个中国”，  
 bàzhànle wǒ guó lǐngtǔ Táiwān, hái yīnmú zhìzào “liǎng gè Zhōngguó”,  
 tirane okupi mi lando teritorio Tajvan plie intrigi fabriki du ... Ĉinio  
 Tajvan per armitaj fortoj kaj plie intrigas por fabriki “du Ĉiniojn”, kun aroganta

妄图把台湾永远从中国分割出去。这是  
 wàng tú bà Táiwān yǒngyuǎn cóng Zhōngguó fēngè chūqu. Zhè shì  
 arogante provi ... Tajvan por ĉiam de Ĉinio tranĉi de tio esti  
 intenco por ĉiam detranĉi Tajvan de Ĉinio. Tio estas

我国人民绝对不能容忍的。我们一定要  
 wǒ guó rénmin juéduì bùnéng róngrěn de. Wǒmen yīdìng yào  
 mi lando popolo absolute ne eble toleri -a ni nepre -os  
 absolute netolerebla por la popolo de nia lando. Ni nepre liberigos Tajvan

解放台湾，完成祖国的统一。  
 jiěfàng Táiwān, wánchéng zǔguó de tǒngyī.  
 liberigi Tajvan efektivigi patrolando de unuigi)  
 kaj efektivigos la unuigon de la patrolando.

[Klarigo] En ĉiuj unuaj linioj estas ĉinaj ideografiaĵoj; en ĉiuj duaj linioj estas ties skribformo en la fonetika alfabeto; en ĉiuj triaj linioj estas signifoj de koncernaj vortoj en Esperanto; kaj en ĉiuj kvaraj linioj estas esperanta traduko de la frazoj.

# Batalo por Savi la

## Olean Ŝipon "Titiki"

**A**NTAŬ nelonge, la cipra olea ŝipo "Titiki" perdis sian movkapablon pro perturbo de la ĉefmotoro kaj petis urĝan helpon de la koncerna instituto de nia lando, flosante sur la maro sudokcidente de la insulo Hajnan. La gvidantaro de nia haveno Ĝangiang tuj sendis la trenŝipon "Ganggian n-ro 1" al la loko por doni helpon.

La elsendita ŝipo iris plenvapore kaj en la sekvinta tago atingis la lokon. Kiam la maristoj sur la ŝipo "Titiki" vidis la ruĝan flagon kun kvin steloj, ili eksaltis de ĝojo kaj kriis: "Venis ŝipo de la socialisma Ĉinio!" Kutime por treni ŝipon kun 23,000 toneloj, kia "Titiki", oni uzas trenŝipon kun kapablo de 3,000 ĉevalpovoj, sed "Ganggian n-ro 1" havas kapablon de nur pli ol 1,000 ĉevalpovoj. Tiam la Suda Ĉina Maro estis en sezono de ventegoj kaj leviĝis ondegoj sub forta blovado. Estis malfacila tasko treni "Titiki" al Ĝangiang de pli ol 300 maraj mejloj fore.

Sed la kamaradoj de la trenŝipo plenaj de batalvolo tute ne timis antaŭ la vasta ondanta maro. Ili decidis venki la malfacilojn plenenergie por savi "Titiki".

Post trenado de iu distanco, subite leviĝis nordorienta vento de 6-7 gradoj sur la maro. Puŝata de la ondegoj, la balancado de la trenŝipo subite kreskis ĝis pli ol 30 gradoj kaj iris malfacile. Tiam la komunisto Hie Venhua kuraĝigis la kamaradojn sur la trenŝipo, citante la vortojn de Prezidanto Maŭ "Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon". Iuj komencis vomi kaj tamen persistis en la luktado. La kapitano firme restis ĉe la direktejo kaj de tempo al tempo faris decidemajn kaj fortajn ordonojn, por teni la navigacian direkton.

Ĉiam pli forte blovis la vento kaj ĉiam pli alte leviĝis la ondoj. La trenŝipo estis jen levita sur ondokreston jen ĵetita en ondvalon. Pro la serioza devia skuado dekstren kaj maldekstren, la kontraŭfrotaj protektiloj sur la trenkabloj rapide difektiĝis kaj frotdifektiĝo serioze minacis la kablojn. Se rompiĝos la kabloj, "Titiki" forglitos kun la ventego kiel senbridigita sovaĝa ĉevalo. En tiu

tempo homo laboranta sur la ferdeko de la poŭpo de la trenŝipo povis esti facile forportata de vento aŭ ondo en la maron. Sed, la vicsekretario de la partia filio kaj malnova ĉefmaristo Daj Minggi alkuris spite al la danĝero kaj lin sekvis la maristoj Ĉen Linkjuan kaj aliaj. Luktante kontraŭ la ondegoj, ili rapide alfiksis novajn protektilojn sur la kablojn kaj evitis rompiĝon.

Post kvintaga malfacila navigado "Ganggian n-ro 1" venis al Tongguzuj proksime al iu insulo, trenante post si la ŝipon "Titiki". Tiu loko estas konata kiel areo danĝera. Sibilis vento kaj ruliĝis grandegaj ondoj. Ĝuste en tiu tempo trenkablo kroĉiĝis al rifo. La ŝipo ne povis plu antaŭeniri. En tiu kriza momento, Ĉen Linkjuan faris ĉiujn klopodojn kaj evitis implikon de la trenkabloj al la helico. Kaj la trenŝipo daŭre tiris la "Titiki" antaŭen.

Kiam la trenŝipo komencis iri laŭ la navigacia vojo en la havenon, subite malboniĝis denove la vetero. Furiozis vento kaj ruliĝis ondegoj. Sub la premo de la vento, denove okazis al la "Titiki" serioza devia skuado. La trenkabloj estis treege streĉitaj. "Pa, pa, pa," subite rompiĝis tri dikaj nilonaj kabloj. La devia skuado de la "Titiki" ankoraŭ pli serioziĝis. Se oni ne rapide retirus la "Titiki" al la navigacia vojo, ĝi eble algrundiĝus sur malprofundejo kiam la maro malflusos kaj obstrukcus la tutan navigacian vojon al la haveno. La kapitano de la trenŝipo decideme ordonis ĵeti ankron. La maristoj, kiuj laboris sur la ferdeko de la poŭpo, tuj ligis la interrompitajn kablojn al la ĉeno de ĵetita ankro. Tiel la olea ŝipo estis retrenita al la navigacia vojo.

Post septagnokta luktado kontraŭ furioza vento kaj insidaj ondegoj, la ŝipanoj de "Ganggian n-ro 1" fine plenumis sian taskon. Kiam la trenŝipo kun la savita olea ŝipo venis en la havenon Ĝangiang kaj tie haltis, la maristoj de la "Titiki" svarme venis sur la ferdekon kaj salutis al la maristoj de "Ganggian n-ro 1" mansvingante kaj varme kriis: "Granda estas Maŭ Zedong!" "Heroa estas la ĉina popolo!"





*Brave batalante la Popola Liberiga Armeo de Laoso venke konkeris malamikan pozicion de la provinca ĉefurbo de Sam Neua.*

## **Certe Venkos la Armita Batalo de la Popoloj de Sudorienta Azio kontraŭ la Usona Imperiismo**

*Venke disvolviĝas la revolucia armita batalo de la malaja popolo. Jen taĉmento de batalantoj de la Malaja Naciliberiga Armeo ekiros al batalo.*



*Persistante en la longdaŭra popola milito, la popolo en la suda parto de Vjetnamio draŝas la usonan imperiismon kaj ĝiajn lakeojn. Jen batalanto de la heroo liberiga armeo de suda Vjetnamio.*





*Batalantoj de la Popola Liberiga Armeo de Tajlando, aktivantaj en arbaro, pretas por bati venontajn malamikojn.*

*Kun profunda malamego kontraŭ la usona imperiismo la popolo en la norda parto de Vjetnamio aktive jetis sin en la grandan nacisavan batalon kontraŭ la usona imperiismo.*







# Taĉmento Ekstermis Usonajn Kirastrupojn

**T**AĈMENTO de la liberiga armeo de suda Vjetnamio ekstermis usonajn kirastrupojn en la 13-a de aprilo ĉijare.

En matena krepusko la taĉmento estrata de Hai jam aranĝis sian batalpozicion. Antaŭ la pozicio kuŝis ŝoseo, ĉe kies du flankoj la arboj estis detruitaj de la malamiko, kaj tiel formiĝis malplena zono kun larĝo de centoj da metroj.

En la aero ĉirkaŭflugis malamika rekognoska aeroplano por observi la lokon kaj trovi atakcelon por ke la poste venontaj batalbombadaj jetoj faru bombadon kaj mitralpafadon.

Je 10:30 aŭdiĝis pafado de malamikoj kaj motorbruoj de iliaj tankoj kaj kirasaŭtoj en la direkto sude de la arbaro. La politika direktanto de la taĉmento ordonis per laŭparolilo: "Rigore gardu la kaŝitecon kaj ekpafu nur, kiam la malamikoj alproksimiĝos en tre mallonga distanco!" Unuaj venis la malamikaj tankoj kun surdiga mo-

torbruo. Tiuj "testudkarapacoj" de la malamiko puŝfalis vicojn da arboj kaj eliris unu post alia el la arbaro, malkovrante sin sur la ŝoseo antaŭ la pozicio. Ili venis al la embuskejo de la tria grupo de la taĉmento. La tanko de tipo M-41, kiu iris ĉe la fronto, nun distancis de la embuskejo de la pafisto Nguyen Dinh Tran nur 20 metrojn. Li aplombe preparis sin al ekbatalo. Sed, la tanko turnis sin en direkto al la embuskejo de la dua grupo. La sekvinta tanko haltis momenton kaj antaŭenkuris transpremite arbon faligitan sur la vojo. Nguyen Dinh Tran sinregante alĝustigis la celilon. Kaj ĉe ekpremo de la ĉano, ektondris la bazuko. La tanko forte ekbrulis kun densa fumo, trafite ĉe la mezo de sia fronto. La malamikoj tuj kontraŭpafis per pafilegoj, kaj iliaj tankoj ĵetis sin flanko ĉe flanko al la loko, kie embuskis la dua grupo. La batalantoj de la liberiga armeo komencis heroan, proksiman batalon kontraŭ la malamikoj kaj disbatis ilin plene. La bazukisto Tran Minh Thinh elsaltis al la malplena zono, kaj utiligante

tie teramason kaj arbotrunkojn kiel ŝirmon faris sinsekve kvar pafojn per bazuko. Kaj kvar malamikaj tankoj kaj kirasaŭtoj estis “ellistigitaj”. En tiu tempo grupestro Cau kondukis batalgrupeton ĉirkaŭiri preter la dekstra alo por ataki grupon da malamikaj militaŭtoj. Per du pafoj li detruis du aŭtojn plenajn de malamikaj soldatoj, el kiuj la ankoraŭ vivantaj estis ĵetitaj sur la teron. Kaj batalanto Nguyen Duy Chien tuj sturmis kaj per maŝinpafo de kartoĉujo da kugloj ilin ekstermis. La batalgrupeto gvidata de vicdirektanto Vinh embuskis ĉe la maldekstra flanko de la pozicio de la dua grupo. Tie la tereno estas kompleksa, kaj dense kreskas sovaĝaj herboj. Ne estis facile trovi konvenan lokon por instali armilojn. Kiam ili trovis teramason kaj instalis armilojn, ili rimarkis ke iu malamika tanko provis eskapi en fumo. Sed, eksonis bazuko kaj post ekfulmo leviĝis flamanta fajrego sur la tanko.

Kvankam suferinte teruran fiaskon, la malamiko ankoraŭ freneze baraktis. Nombro da malamikaj kirasaŭtoj troviĝantaj poste ekpafis forte kontraŭ la pozicio de la liberiga armeo. Krome, aliaj kvin kirasaŭtoj ĉirkaŭiris de maldekstre por ataki la flankon de la pozicio. Sed la tria grupo de la liberiga armeo tie jam longe atendis en preteco kaj regalis ilin per celtrafaj kaj fortaj pafoj. La bazukistoj Tuoc, An, Nghe k.a. detruis kvar el la kvin

kirasaŭtoj de tipo M-113. La kvina retiriĝis en paniko, Thuan, estro de meza grupo, ordonis la batalantojn ekstermi la malamikojn sur la aŭtoj per mitraletoj. Tiel, la liberiga armeo donis pezan baton al la unua roto de la dua bataliono sub la dekunua kirasa regimento de la usona armeo. La postrestanta parto de la roto fortiriĝis malproksimen por reordigi sin kaj peti helpon. La malamiko ekspedis aeroplanojn por ataki la pozicion de la liberiga armeo kaj bombardis kontraŭ ĝi. Sed la batalantoj de la liberiga armeo decidis.: “Firme batali ĝis la fino, se ankoraŭ restas malamikoj.”

Je la dua horo posttagmeze de la sama tago, la malamiko denove elsendis sian trian roton de la sama bataliono por ataki la pozicion de la liberiga armeo de la okcidenta flanko. En tiu batalo aperis en la taĉmento multaj kortuŝaj heroaĵoj. Persistante en la batalo malgraŭ vundiĝo de la brako, Lai Van De sturmis antaŭen kaj ekstermis plie tri malamikajn tankojn. La batalantoj ĉiuj luktis tigre, lerte manovris kaj ekstermis malamikajn tankojn unun post alia. La pafado ĉesis je 30 minutoj post la dua posttagmeze. La taĉmento de la liberiga armeo de suda Vjetnamio faris brilan batalon kun batalrezulto de ekstermo de 37 malamikaj tankoj kaj kirasaŭtoj kaj mortigo de pli ol cent usonaj rabistoj.

## Moderna Baledo

### “Blankhara Knabino”


### Prezentita de Japanoj

**L**A ĉina moderna revolucia baledo *Blankhara Knabino* disradiana la brilon de Maŭzedongpenso estas prezentita en Tokio de la fama japana Macujama Baleda Trupo post ĝia revizio. Ĉirkaŭ 4,000 japanaj spektatoroj rigardis kun granda entuziasmo tiun baledon.

Multaj estis profunde kortuŝitaj de la prezentado, iuj eĉ ĝis larmado. Ili laŭdis, ke la baledo estas plena de Maŭzedongpenso kaj vere spegulanta batalan vivon de la laboranta popolo, kaj ke ĝi havas

klaran klasan karakteron, artan emocian forton kaj grandan realan signifon ankaŭ por Japanio. Multaj rigardintoj diris, ke post la spektado de *Blankhara Knabino*, ili estas tre kuraĝigitaj kaj ilia batalvolo kontraŭ la “Sekureca Traktato inter Japanio kaj Usono” estas multe fortigita. Kaj ili laŭdis, ke la prezentado propagandis Maŭzedongpenson al la batalanta japana popolo kaj alportis al ĝi spiritan forton por oponi kontraŭ la usonaj kaj japanaj reakciuloj. Iu diris, ke hodiaŭ multaj en Japanio vivas mizeran vivon sub la subpremo de la usona imperi-





*Spektatoroj de diversaj rondoj de Japanio rigardas modernan baledon Blankhara Knabino prezentatan de la japana Macujama Baleda Trupo.*

ismo kaj japanaj reakciuloj. Tamen, plenaj de rezistema spirito, same kiel Daĉun kaj Hi-er, ili certe en iu tago leviĝos por renversi la grandan monton, kiu pezas sur ilia kapo.

Parolante pri tiu ĉi prezentado, la estro de la trupo Simizu Masao speciale emfazis ĝian realan signifon de servo al nuna batalo de la japana popolo. Li diris: “Ni devas koni la realon de Japanio kaj kiel eble apliki kion ni lernis el *Blankhara Knabino* de Ĉinio, en nia praktikado por montri la vojon kiun ni devas sekvi.” Tial, dum la prezentado, la baleda trupo elstarigis la grandan veron “**El la pafilo venas ŝtatpotenco**” kaj la brilan penson de popola milito de Prezidanto Maŭ, kaj emfaze prezentis la revolucian spiriton de la ĉinaj kamparanoj reprezentataj de Daĉun, Hi-er kaj Jang Bajlaŭ kiuj malmis perforton, kuraĝis batali kaj kuraĝis venki sub la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio.

En la jaroj 1958 kaj 1964, la nomita baleda trupo dufoje vizitis Ĉinion kaj faris prezentadon. Ankaŭ dum nia Granda Proletara Kultura Revolucio, parto de la aktoroj de tiu baleda trupo dufoje vizitis Ĉinion kaj rigardis revoluciajn modelajn teatraĵojn, persone kulturitajn de kamaradino Giang King sub la direktado de la proletara revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ.

En la jaro 1964, la granda gvidanto Prezidanto Maŭ rigardis la prezentadon de Macujama Baleda

Trupo en Pekino kaj donis aŭdiencon al la gvidantoj kaj ĉefaj ludantoj de la baleda trupo. Tial, dum la ekzercado de *Blankhara Knabino* ĉifoje, rememorente la feliĉan momenton, en kiu ili propraokule vidis la grandan gvidanton Prezidanton Maŭ kaj kamaradinon Giang King, ili ne povis regi sian emocion. Kaj ili diris: “La intima aŭdienco donita de Prezidanto Maŭ multe kuraĝigis nin.” Por bone plenumi tiun ĉi prezentadon, la artistoj de la baleda trupo studis ripetade la koncernajn instruojn de Prezidanto Maŭ. Macujama Mikiko, vicestro de la baleda trupo kaj unu el la rolantoj de Hi-er, diris: “La problemo al kiu servu la literaturo kaj arto, elmetita de Prezidanto Maŭ en *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* komprenigis al ni ke ni devas uzi la artoformon de baledo por servi al la revolucia batalo de la japana popolo.” Ankaŭ multaj aliaj aktoroj diris, parolante pri la ĉi-foja prezento de *Blankhara Knabino*: Prezidanto Maŭ instruas al ni: “**Nia celo estas por fari literaturon kaj arton konsistiga parto de la tuta revolucia maŝino, fari ilin potenca batalilo por unuigi kaj eduki la popolon kaj por bati kaj ekstermi la malamikon, kaj helpi la popolon batali kontraŭ la malamiko unuanime.**” Kiel japanaj literaturaj kaj artaj batalantoj ni devas preni la literaturon kaj arton kiel armilon por malkovri la usonajn kaj japanajn reakciulojn, vekti la popolon, kaj kuraĝigi ĝin batali kontraŭ la usonaj kaj japanaj reakciuloj, faligi ilin kaj akiri sian liberigon.

# Songô de la Japana Militarismo

**L**A japana militarismo, kiu jam reviviĝis subtenate de la usona imperiismo, kun granda ambicio, dronas en songô pri denova regado super Azio. En la lastaj jaroj, la japana reakciularo senprudente kriaĉis ke ĝi turnos Japanion en "militan potencon". Alfrontante la reviviĝon de la japana militarismo, la aziaj popoloj devas altigisian gardemon.

## LA DUA GRANDA EKSPLUATANTO EN AZIO

Kia "ekonomia potenco" estas Japanio? Ĉiuj scias, ke Japanio estas reakcia lando kruele subpremanta kaj ekspluatanta la japanan popolon kaj freneze prirabanta la aziajn popolojn. La japana monopola kapitalo rabas tre malkarajn krudaĵojn de aliaj landoj kaj post prilaborado de la krudaĵoj vendas altpreze en fremdlandaj merkatoj por ĉasi profitegojn kaj riĉigas sin per sia subteno al la agresaj militoj faritaj de la usona imperiismo. Jen estas la tiel nomata "ekonomia potenco" brue fanfaronata de la japana reakciularo.

La ĉefaj industriaj krudaĵoj bezonataj de Japanio estas plejparte akiritaj el la tiel nomataj "subevoluintaj landoj" pere de rabecaj negocoj kaj "investado por ekspluatado". La sudorienta Azio, kiu estas relative proksima al Japanio kaj havas abundan riĉfonton, fariĝis la unua prirabata objekto de la japana monopola kapitalo. La kliko de japana monopola kapitalo jam kaptis la rajtojn de prospektorado kaj ekspluatado de petrolo, baŭksito, nikelo, kupro, arbaro en Indonezio. Hindio fariĝis bazo de Japanio por rabi ferercon. Krom tio, la kliko de japana monopola kapitalo etendis siajn ungegojn al la Meza Oriento, Afriko, Latinameriko k. a. por rabi tie petrolon, kupron, uranion, ferercon kaj aliajn strategiajn materialojn.

Nun, la eksporto de Japanio al la sudorienta Azio jam okupas trionon de ĝia totala eksporto,

kaj eksporto de Japanio estas grandkvante superflua. Ĝia eksporto al suda Koreio, Singaporo, Tajlando k. a. jam superis tiun de Usono kaj okupas la unuan lokon.

Por turni la sudorientan Azion kaj aliajn regionojn en "stabilajn" provizejojn de krudaĵoj, merkatojn kaj prilaborojn, la reakcia registaro kaj la monopola kapitalo de Japanio intensigas sian regon super la ekonomia aorto de multaj landoj en tiuj regionoj per diversaj formoj kiaj milita reparacio, investo, pruntedono, ekonomia "kunlaboro", "hel-po", plilongigita eksporta kredito, k. a. Laŭ raporto, la kredito de Japanio eksterlande kreskis de 9,281,000,000 dolaroj en la fino de 1967 ĝis 15,070,000,000 laŭ kalkulo en la fino de 1969. Nun, la investo de Japanio al Tajlando, Singaporo k. a. okupas la unuan lokon inter aliaj landoj investantaj en tiu regiono. Kaj koncerne sudan Koreion, ĝi antaŭlonge jam fariĝis grava loko de investado por Japanio.

La japana reakciularo akiras ĉiujare enspezon de pli ol miliardo ĝis pli ol du miliardoj da dolaroj pro sia subteno al la agresaj militoj de usona imperiismo kontraŭ Vjetnamio kaj sia plenumo de mendo de la usona imperiismo pri militaj provizoj. Japanio jam fariĝis "azia arsenalo" de la usona imperiismo. Sinriĉigo en helpo al la usona imperiismo en ĝiaj agresaj militoj estas grava faktoro por stimuli la ekonomian ŝvelon de Japanio.

Ĉio ĉi tio plene pruvis, ke nun en la regiono de Azio la japana reakciularo estas la dua granda ekspluatanto nur iom malpli granda ol la usona imperiismo.

## VANA PROVO POR TROVI ELIREJON PER MILITAJ AVENTUROJ

La japana reakciularo, kiu fariĝis parvenuo pro sia sekvado de la agresaj kaj milita politiko de la usona imperiismo, unuflanke intensigas armeekspansion kaj militpreparon kaj aliflanke



senskrupule kriaĉas, ke kiel “potenco” Japanio “plenumos” siajn “internaciajn devojn”. Tio estas danĝera signo, ke la japana militarismo hastas al milita agreso.

La monopola kapitalo de Japanio alfrontas akrajn kontraŭdirojn inter la maligne ŝvelanta industria produktpovo en unu flanko kaj la malfaciloj de fonto de krudaĵoj kaj la malvasteco de eksterlandaj merkatoj en la alia flanko. Japana burĝara gazeto konfesis, ke nun en la japana monopola kapitalo “estiĝas ia ‘teruro pro eksceso de la produktado’ ” kaj la “fervora grado” en diskutado pri la problemoj de riĉfontoj “rememorigas la scenon en antaŭvespero de la Dua Monda Milito”. Por eskapi el la ekonomia krizo, la japana reakcia reganta kliko pli kaj pli forte pledas por puŝi la japanan ekonomion sur militigan vojon. Iuj grandaj monopolaj financaj klikoj forte postulas de la japana registaro grandkvante plimultigi militajn mendojn por plirapidigi plivastigon de la municia produktado. Kalkulante la superprofiton el la gigantaj militaj mendoj de la registaro, iu monopola kapitalisto akceptanta la mendojn diris kun ridmiĝo: “Kie oni povas fari tiel favoran negocon!”

Ĉefo de japana financa kliko diris senkaŝe, ke Japanio ne devas “ekspansii eksteren kun malplenaj manoj”, sed “devas utiligi siajn militajn fortojn

kiel apogilon” kaj ekspedi sian armeon al transmaraj landoj por “protekti” la “ekonomiajn interesojn” de Japanio en aliaj landoj. La japana reakciularo nomas la vastan regionon de la Pacifiko ĝis la Hinda Oceano “vivlinio” de Japanio, proklamante “ekspedon de gardŝipoj” al Malakamarkolo. En la okuloj de la japana reakciularo, ekonomia agreso kaj armeekspansio kaj militpreparo estas “kvazaŭ du radoj de sama ĉaro”. Evidente, la japana reakciularo intencas preni armitajn fortojn kiel apogilon por senskrupule fari agresadon kaj ekspansion eksteren, prirabi fonton de krudaĵoj, merkatojn kaj lokojn de investado, kaj por tio sin preparas al militaj aventuroj.

Ĝuste pro tio, la milita strategia principo alprenita de la japana reakciularo pli kaj pli senkaŝe emfazas agreson. La Sato-registaro foje kaj refoje kriaĉas ke ĝi devas enkonduki Koreion kaj la ĉinan sanktan teritorion Tajvan-provinco en la “defendatan” sferon de Japanio. Ĝi ankaŭ aktive klopodas por servi al la usona imperiismo en ties agresa milito kontraŭ Hindoĉinio. Tiuj faktoj plene montris, ke la agreso de la japana reakciularo estas direktata unue al la ĉina popolo, korea popolo kaj hindoĉiniaj popoloj.

Por realigi sian ekstravagancan celon de “milita potenco”, la reakcia Sato-registaro furioze plimul-

*Popolanoj de diversaj rondoj de Japanio okazigas manifestacion por oponi kontraŭ revivigo de la japana militarismo.*





*Alte tenante tabulojn kun surskribitaj sloganoj kiaj “Frakasu la entrudiĝon de la usona imperiismo al Kamboĝo”, “Frakasu la Japan-usonan Sekurecan Traktaton”, japanaj popolanoj manifestacias en Tokio.*

tigas militajn elspezojn por intensigi armeekspansion. Ĝi unuflanke rapidigas efektivigon de la tria armeekspansia plano, kaj aliflanke pretas antaŭtempe efektivigi la kvaran, por vaste ekspansii maran, aeron kaj teran armeojn. Ĝi ankaŭ planas multobligi la “rezervajn memdefendajn oficirojn” kelkdek milojn nombrantajn, por mobilizi grandan kvanton da armeanoj al aktiva servo en okazo de sia lanĉo de agresiva milito. Por “altigi” la “longdistancan atakan forton” de la “memdefendaj trupoj” de Japanio, la reaktiva Sato-registaro aktive esploras kaj fabrikas misilojn kaj raketojn, sin preparas al armado per nukleaj armiloj, planas armi la japanan armeon per “misiloj” kaj “elektro-naj armiloj” en kelkaj jaroj.

Tiel energie plifortigante militajn maŝinojn la japana militarismo celas koluzii kun la usona imperiismo por fari agresan militon en oportuna ŝanco.

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris: “Tiu, kiuj avidas militon kaj ne volas pacon, estas nur iuj monopolaj kapitalistaj grupoj en plenmano

da imperiismaj landoj, kiuj sin riĉigas depende de agreso.” En Japanio, plenmano da avidaj reakciaj fortoj sopirantaj sin riĉigi depende de milito puŝas Japanion sur la vojon de sinpreparo al agresiva milito.

### CERTE BANKROTOS LA SONĜO DE AGRESO

La usona imperiismo intensigas efektivigon de la insidema intrigo “batali kontraŭ azianoj per azianoj”. La publikigo de la komuna komuniko de Japanio kaj Usono en la pasinta novembro montris, ke la japana reaktiularo jam estas utiligata de la usona imperiismo kiel ĝendarmo en Azio. Nun, la japana reaktiularo liveras multe da “helpo” al la pupa kliko de suda Vjetnamo, helpas la usonan imperiismon antaŭenpuŝi “vjetnamigon” de la agresiva milito kontraŭ Vjetnamio, plivastigas aerodromojn kaj konstruas elektrajn staciojn por la laosaj dekstruloj, servante al la usona imperiismo en ĝia plivastigo de la agresiva milito kontraŭ Laoso. Ĝi plenergie kuraĝigas kaj helpas la kamboĝan



dekstrulan klikon, klopodante por servi al la usona imperiismo en ties plivastigo de la agresa milito kontraŭ Hinduĉinio. Ĉio ĉi tio plene montris, ke la japana reakciularo intencas preni la usonan imperiismon kiel sian apogilon por denove domini Azion kaj ripeti la belan sonĝon pri "Kunprospera Sfero de Granda Orienta Azio".

Kiam la japana militarismo freneze faras agre-sajn aktivadojn kaj sin preparas al militaj aventuroj en Azio, en la mondo estas kelkaj homoj kiuj intensigas sian koluzion kun ĝi kaj faras kun ĝi malpuran negocon kaj per tio plialtigas ĝian arogantecon.

Sed eraris la kalkulo de la japana reakciularo. Jam forpasis por ĉiam la tempo en kiu la imperiistaj

lupoj povis laŭvole buĉi popolanojn de Azio.

Nun estas la granda epoko, en kiu imperiismo iras al kompleta disfalo, dum socialismo iras al venko en la tuta mondo. Al la situacio en Azio jam okazis mondiskua ŝanĝiĝo. La vasta japana popolo kun ĉiam pli kreskanta konscio kondukas heroan batalon kontraŭ la usona kaj japana reakciularo kiu revivigas la japanan militarismon. La ĉina popolo, korea popolo, hinduĉiniaj popoloj kaj aliaj aziaj popoloj plue plifortigas sian unuiĝon por kune batali kontraŭ la agresaj aktivadoj de la usona imperiismo kaj la japana militarismo. Se la japana militarismo aŭdacos trudi novan militon agresan al diverslandaj popoloj de Azio, ĝin atendos nur fiasko pli tragika ol tiu trafita de Toĝo Hideki.



## GRANDA KANALO FINKONSTRUITA

Post sesmonata penema luktado en malfaciloj, la granda kanalo de nia lando Hanbej-rivero en Hubej-provinco jam venke finkonstruiĝis.

La nove fosita Hanbej-rivero longa je pli ol 110 kilometroj kaj profunda je 7 metroj fluas tra kvin gubernioj, kiuj formas la koncentran produktejon de greno kaj kotono de Hubej-provinco. En tiu malalta regiono estas multaj lagoj kaj densa reto da riveroj kaj en la pasinteco tie troviĝis nur unu malgranda zigzaga drena rivero Laŭtianmen kaj du malgrandaj drenaj kluzoj, tial superakvego okazis ĉiufoje, kiam torentis pluvego. Post la finkonstruo, Hanbej-rivero, kiu interligas la ĉefajn lagojn en tiu regiono, povas konduki superfluan akvon en Jangzi-riveron kaj Hanguang-riveron. Je la fino de majo en la

kuranta jaro, kiam apenaŭ finkonstruiĝis la kanalo, ĝi jam donis unuapaŝe bonan efikon. Tiutempe, falis pli ol 300 milimetroj da torenta pluvo en unu fojo, sed ĉar la pluvakvo povis esti fordrenita per la kanalo, la akvonivelo de la lagoj en tiu regiono estis 3 metrojn pli malalta ol antaŭe, kiam okazis tia pluvego, kaj tiamaniere la kampoj en tiu regiono ne suferis inundan katastrofon.

## TRAKTORO DE HIDROSTATIKA TRANSMISIO

Persistante sur la vojo sinapogi sur la propraj fortoj, la revoluciaj laboristoj de la Ŝenjang-a Fabriko de Agrokulturaj Maŝinoj Dongfanghong sukcese provfabrikis 40-ĉevalpovan traktoron de hidrostatika transmision sub la kondiĉoj de manko de bluplanoj kaj specialaj ekipaĵoj.

La movforto de traktoro de hidrostatika transmision estas komunikata per altprema oleo. Kompare kun traktoro de dentradara transmision, ĝi estas pli simpla en strukturo kaj pli facile manipulebla kaj turnebla.

## LAOSAJ ARMEO KAJ POPOLO FALIGIS KAJ DETRUIS 1,500 USONAJN AVIADILOJN

De la 17-a de majo, 1964, ĝis la 16-a de julio, 1970, la patriotaj armeo kaj popolo de Laoso faligis kaj detruis entute 1,500 aviadilojn de la usonaj banditoj.

Tiu brila venko de la laosaj armeo kaj popolo montras, ke teruran malvenkon trafis la intrigo de la usona imperiismo per aera armeo konduki agresan militon en Laoso, minaci la laosan popolon, subfosi la solidigon kaj konstruadon de la liberigita regiono kaj kunagi kun la dekstrulaj trupoj de Laoso en atako al la liberigita regiono, kaj ke la "supereco en aero" de Usono estas tute venkita.

La heroaj laosaj armeo kaj popolo firme decidis batali ŝultro ĉe ŝultro kun la frataj vjetnama kaj khmera po-

poloj, decideme venki la agreson de la usona imperiismo, forpeli la usonajn imperiistojn el Hindaĉinio kaj batalakiri la kompletan venkon de la kontraŭusona nacisava batalo.

## NOVAJ VENKOJ DE LA POPOLAJ ARMITAJ FORTOJ DE TAJLANDO

Respondante la alvokon de la Komunista Partio de Tajlando, la bravaj patriotaj armeo kaj popolo de Tajlando plifortigis, en la unua duono de la kuranta jaro, la armitan batalon kontraŭ la reakciuloj de Usono kaj Tajlando kaj akiris novajn venkojn en multaj regionoj de la tuta lando.

En la unua duono de la kuranta jaro, la patriotaj armeo kaj popolo en la norda parto de Tajlando faris ĉ. 150 atakojn al la malamiko, ekstermis ĉ. 400 reakciajn armeanojn kaj policanojn, faligis kaj difektis ĉ. 20 aviadilojn de la malamiko, detruis ĉ. 50 militajn veturilojn, ruinigis plurajn apogpunktojn de la malamiko kaj batalakiris grandan kvanton da armiloj kaj aliaj militaj materialoj. La Popola Liberiga Armeo ne nur frakasis plurajn militajn "ĉirkaŭekstermojn" de la reakciuloj,

*Partizana taĉmento aktivanta en provinco Xieng Khouang de Laoso interŝanĝas en baltalkampo batalan sperton pri paffaligo de pirataj flugmaŝinoj de Usono per fusiloj.*







*Kunvenas batalantoj de iu trupo de la Popola Liberiga Armeo de Tajlando.*

sed ankaŭ aktive atakis la malamikon kaj plivastigis la gerilajn regionojn.

En la nordorienta parto de Tajlando, sole en junio la Popola Liberiga Armeo de Tajlando jam faris ĉ. 30 heroajn atakojn al la malamiko, ekstermis grandan nombron da malamikoj kaj krome disvolvis en la lokoj aktivadojn por mobilizi la amasojn, ekstermi perfidulojn kaj batali kontraŭ lokaj tiranoj.

En la suda parto de Tajlando, precipe ĉe la landlimo inter Tajlando kaj Malajo, la patriotaj armeo kaj popolo de Tajlando senĉese faris atakojn, multe vundis kaj mortigis malamikojn kaj batalakiris nombron da armiloj de la malamiko.

Kuraĝigate de la senĉesaj venkoj de la Popola Liberiga Armeo de Tajlando, multaj tajlandaj junuloj sin liberigis de la kontrolado kaj partoprenis batalon kontraŭ la usonaj agresantoj kaj tajlandaj reakciuloj.

## **LA MALAJA NACILIBERIGA ARMEO SUKCESE EMBUSKIS MALAMIKON**

La 26-an de junio de la kuranta jaro, trupo de la Oka Brigado de la Malaja Naciliberiga Armeo aktivanta en limregiono inter Malajo kaj Tajlando denove sukcese embuskis patrolon de la malamiko, mortigis kaj vundis pli ol dek malamikojn kaj kaptis nombron da armiloj kaj aliaj militaj materialoj.

Dume, la naciliberiga armeo faris en multaj vilaĝoj vastan propagandon kaj organizadon inter la amasoj kaj ricevis varman subtenon de ili.

Por memori la 22-an datrevenon de la Naciliberiga Milito kontraŭ Britio disvolvita de la popolo sub la gvido de la Malaja Komunista Partio, la revoluciaj amasoj en diversaj lokoj de Malajo vaste faris en junio diversformajn armitajn batalojn kontraŭ la pupa reĝimo.

La tagoj de la kapitalistoj, imperi-  
istoj, reviziistoj kaj aliaj reakciuloj  
certe ne restas multaj. Por ili la  
Cinio kaj la revoluciaj fortoj en  
la tuta mondo igas pli fortaj kun  
tiu tago.

Kiam mi aŭdis tiun grandan  
novajon, mi sentis kvazaŭ la cirkaŭ-  
aĵoj sin ŝanĝas, kaj kvazaŭ mi vidis  
la mondon per tute novaj okuloj.  
Vi akiris novan, grandegan venkon.  
Tio estas granda stimulo por la  
tutmonda revoluciaro.

popolon, la Komunistan Partion  
de Ĉinio kaj viajn grandajn gvidan-  
tojn.

Ricevu mian plej koran gratulon  
pro la sukcesa lanĉo de artefarita  
tersatelito. Mi ne nur gratulas  
al vi ĉinaj esperantistoj, sed mi  
ankau deziras gratuli la tutan ĉinan

## LETTERO DE NORVEGA LEGANTO E. O.

Ĉu ankoraŭ ne sufi-  
ĉas iliaj agadoj en Vjetnamio kaj  
Laoso? Mi opinias, ke ĝis nun  
la rezultoj de iliaj enmiksigoj en  
la aziajn landojn jam superas de  
longe la limojn de pacemo, amikeco  
kaj justeco.

Tial mi kun mia tuta klopodo  
disvastigos kaj apogos vian daŭran  
propran agadon.

Mi bone ricevis la malgrandan  
broŝuron enhavantan la deklaron  
de mia nekomparebla gvidanto Maŭ  
Zedong je la 20-a de la lasta majo.  
En ĝi li montris la malan rolon  
refoje Juditan de la usona impe-  
rismo en Kamboĝo.

## LETTERO DE BELGA LEGANTO P. N.



“Transporti arope” estas grava timedo por  
eksploato de la latentaj povo de la havenoj  
kaj surakva transporto kaj altiĝo de la labor-  
efiko en ŝarĝo kaj malsarĝo en nia lando.  
Ĝi estas tute konforma al la principo de mul-  
teco, rapideco, bonkvaliteco kaj ekonomieco.  
La nova metodo karakterizigas per tio, ke  
oni arope kummetas kelkajn aŭ kelkdek trans-  
portajn objektojn ĉe la elporta haveno per  
specialaj iloj, transportas ilin kune kun la  
iloj kaj kiam la varoj atingas la cellokon, oni  
ilin elŝipigas same arope. Dank’ al apliko  
de tiu metodo, altiĝis la laborefiko de ŝarĝo  
kaj malsarĝo kaj pli bona estas la transporta  
kvalito, tial ĝi estas bonvenigata de la vastaj  
portistoj kaj industriaj kaj komercaj entre-  
prenoj.

Post apliko de tiu metodo, Ĝangi-ang-haveno  
de Ĝuangdong-provinco akiris pli ol 40-po-  
centan altiĝon de la laborefiko de malsarĝo.  
La ankurada tempo de ŝipoj en la haveno mal-  
longiĝis de la antaŭaj 4-6 tagoj ĝis 3-2 tagoj.  
Kaj la tralasa kapablo de la haveno al ŝipoj  
altiĝis ĉirkaŭ unuoble.

Nuntempe, la branĉo de surakva trans-  
porto de nia lando estas pliapase altiĝanta  
kaj disvastiganta la avangardan metodon  
“transporti arope”.

La vastaj amasoj de laboristoj de la havenaj  
administracioj de Sanhaĵo, Dalian, Tianĝin  
k. a. de nia lando sukcese kreis la novan me-  
todon “transporti arope”, dank’ al kies apliko  
multe altiĝis la laborefiko de ŝarĝo kaj mal-  
sarĝo, rapideciĝis la ĉirkulado de ŝipoj kaj vago-  
noj kaj grandigiĝis la en- kaj el-lasa kapablo  
de la maraj kaj riveraj havenoj por ŝipoj kaj  
kargoj. Nun, tiu avangarda metodo jam  
disvastiĝis al la nordaj maraj havenoj kaj  
la ĉefaj havenoj de la trunka linio de Ĵangzi-  
rivero kaj suda Ĉinio kaj forte rapideciĝis la  
materian interfluon inter urboj kaj vilaĝoj  
kaj inter diversaj regionoj konforme al la  
bezono de la disvolviĝo de la industria kaj  
agrikultura produktio.

## LA NOVA METODO “TRANSPORTI AROPE”





## *Sur la Kovrilo:*

Kun la alta volo gajni gloron por Prezidanto Maŭ kaj la socialisma patrolando, la eksperimenta grupo de novaj produktaĵoj de la 17-a Radiofonia Fabriko de Ŝanhajo plene rompis la misterecon de elektrono, iras propran vojon de disvolvo de elektrona industrio kaj sukcesis fabriki post provado novan elektronan produktaĵon kun progresinta nivelo. Per tio ĝi faris novan kontribuon al rapida disvolvo de la elektrona industrio en nia lando. Nun ĝiaj membroj provas fabriki alian novan produktadon.

## *Sur la Dorskovrilo:*

Plonĝo de ĉinaj sportistoj en la naĝbaseno Taŭjanting, Pekino.

# EL POPOLA ĈINIO

人民中國報

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 10 (147) 1970

## Ĉefa Enhavo

- Prezidanto Maŭ Intervidiĝis kun la Franca Registara Delegacio Estrata de Ministro A. Bettencourt
- Vizito de la Franca Registara Delegacio al Ĉinio
- Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj Donis Intervjuon al Francaj Ĵurnalistoj
- Kreado de Alta Produkto de Koton kaj Greno Fare de Jangliuhjue-brigado
- Elektraj Stacioj Starigitaj ĉe Montfluejoj kaj Riveroj
- Terkulturado laŭ Scienca Maniero en la Kvara Produkta Grupo de Bajjanghe
- Nova Aspekto de Tibeto
- Rapide Disvolviĝis la Maŝinfabriko, Kemisterka kaj Elektropova Industrioj de Nia Lando
- Nova Vojo Elhakita en Nia Ŝipkonstrua Industrio
- Rapidega Konstruado de Dekmil-tonelaj ŝipoj
- Maĉala-a Karbominejo
- Triumfa Kanto de la Petrola Urbo Maŭming
- Naskiĝo de Brakhorloĝoj de Marko "Ŝanhajo"
- Nova Startpunkto
- Kuraci Malsanojn por Komunumanoj
- Batalo por Savi la Olean Ŝipon "Titiki"
- Taĉmento Ekstermis Usonajn Kirastrupojn
- Moderna Baledo "Blankhara Knabino" Prezentita de Japanoj
- Sonĝo de la Japana Militarismo

# Disvolvi sportajn aktivadojn kaj pli- fortigi la fizikan kvaliton de la popolo.

Kun arda revolucia entuziasmo, sportistoj de nia lando firme decidis ankoraŭ pli alte teni la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso kaj fari novajn kontribuojn por disvolvi niajn sportajn aktivadojn.









En iu naĝa konkurso sportistino Je Huanjong novigis la rekordon de virina 100-metra liberaĝado per 1'5.3".



La ĉefurbaj revoluciaj amasoj vaste disvolvas naĝajn aktivadojn por celebri la 4-an datrevenon de la naĝado de Prezidanto Maŭ en Jangzi-rivero.

Komandantoj kaj batalantoj de ĈPLA transnaĝas Kunming-lagon.

Ŝnurtirada konkurso en la Lignofabriko de la Norda Antaŭurbo de Pekino






Gimnastikistinoj faras fundamentan ekzercon.

La Lignofabriko de la Norda Antaŭurbo de Pekino aktive disvolvas amasajn sportajn aktivadojn kaj plifortigas per tio la fizikan kvaliton de sia personaro. Jen laboristoj faras amikan maĉon de korbopilko.





Gimnastikisto ludas rekon.



Tablotenisistoj prezentas sian arton al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj de nia ĉefurbo.

Laboristoj de la Ĝenerala Dizelfabriko de Pekino faras gimnastikan ekzercon.





